Heidi Goes

AFERO DE ESPERO

Konciza historio de
la Esperanto-movado
en Afriko

UEA

Heidi Goes

AFERO DE ESPERO

Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko

Universala Esperanto-Asocio
Rotterdam 2007

Al mia patro, kiu konatigis min kun Esperanto

ISBN 978-92-9017-096-9
© 2007 Universala Esperanto-Asocio
Kovrilo: Francisco L. Veuthey
Presita ĉe Skonpres, Bydgoszcz, Pollando

Enhavo

Enkonduko 7
Antaŭparolo 9
Klarigo pri geografiaj kaj personaj nomoj 10
Uzitaj mallongigoj 11

1. La unuaj paŝoj de Esperanto en Afriko 12
Enkonduko 12
1.1. Norda Afriko 16
1.1.1. Alĝerio 16
1.1.2. Egiptio kaj Sudano 19
1.1.3. Kanarioj 23
1.1.4. Libio 24
1.1.5. Maroko 24
1.1.6. Tunizio 27
1.2. Okcidenta Afriko 28
1.2.1. Ganao 28
1.2.2. Malio 28
1.2.3. Togolando 29
1.3. Orienta Afriko 30
1.3.1. Etiopio 30
1.3.2. Tanzanio 30
1.4. Centra Afriko 30
1.4.1. Gvineo Ekvatora 30
1.4.2. D.R. Kongo 31
1.5. Suda Afriko 31
1.5.1. Angolo 31
1.5.2. Madagaskaro 31
1.5.3. Mozambiko 32
1.5.4. Rodezio 33
1.5.5. Sud-Afriko 33
1.6. Mallonge pri pluraj ceteraj landoj 35
Konklude 38

2. Evoluo de la movado inter 1960 kaj 1980 39
Enkonduko 39
2.1. La Karavano de Amikeco: la malsukcesa komenco? 39
2.2. UEA-ideologio en la komenco de la 1960aj jaroj 41
2.3. Polemiko 43
2.4. La strategio de la junularaj Esperanto-organizoj 46
2.5. UEA-strategio en la malfruaj 1970aj jaroj 50
2.6. De regiona al afrika agado 52

3. Evoluo de la movado ekde 1980 53
3.1. Komenco de la afrika agado 53
3.2. Salta ekapero sur la internacian scenejon 54
3.3. Strategia Plano de UEA 57
3.4. Evoluo ekde 1990 60
3.4.1. Kongresoj kaj periodaĵoj 60
3.4.2. Reorganiziĝo 61

4. La afrikaj kongresoj 63
Enkonduko 63
4.1. Organizo kaj disvolviĝo de la afrikaj kongresoj 63
4.1.1. Unua Afrika Kongreso 63
4.1.2. Dua Afrika Kongreso 65
4.1.3. Tria Afrika Kongreso 66
4.1.4. Kvara Afrika Kongreso 69
4.2. Postkonsideroj 71

Notoj 74
Bibliografio 77
Fontoj de la ilustraĵoj 85

Enkonduko

Por ke Esperanto estu afrika
ne sufiĉas ĝin nomi tia.

La rilatoj inter la Esperanto-movado kaj Afriko tre firme sekvis la ondumadon de la rilatoj inter eŭropanoj kaj Afriko. La teksto de Heidi Goes, kiu sekvas, tre klare montras tion.

Se estas vero, ke la tuta kulturo de la parolantoj de Esperanto kaj de ĝiaj disvastigantoj estas resumebla per la vortoj de la himno, *La Espero*, efektive ekde la komencaj tempoj oni strebis igi Esperanton "flugi de loko al loko" kaj tiel iĝi vere tutmonda. Al Afriko, kiel oni vidos, en la tre detala kaj science kunmetita posta raporto, Esperanto alvenis en la valizoj de la eŭropaj laborantoj en la "kolonioj". Tiuj homoj estis tre bonintencaj homoj, kiuj apenaŭ konsciis sian rolon de subpremantoj, kaj ĝenerale pensis agi por la bono de la lokuloj. Inter aliaj aferoj ili portis al Afriko socialismajn ideojn kaj ankaŭ Esperanton.

En la dua duono de la pasinta jarcento afrikaj landoj sendependiĝis kaj la bonintencaj esperantistoj reveturis hejmen. Tiam oni nepre devis transiri al nova strategio de la movado rilate al Afriko. La verko montras la tiamajn debatojn inter la movadanoj pri la plej preferinda strategio. Pluraj kampanjoj estis tiam entreprenitaj kaj pluraj metodoj estis provitaj. Ni memoru nur pri la karavano de amikeco de la neforgesata Tibor Sekelj.

Certe unu el la plej grandaj kaj celdirektitaj laboroj en la lasta jarcentkvarono estis farata kaj kunordigata de Hans Bakker. Temis pri "rutina" laboro: informado, instruado kaj kreado de homaj rilatoj inter afrikaj kaj eksterafrikaj esperantistoj. Mirakle ĉi tiu pena kaj modesta desubisma vojo estis pli sukcesa ol multaj desuprismaj ideoj kaj klopodoj. Ĝi kondukis al la ekzisto de multaj afrikaj esperantistoj en pluraj afrikaj landoj (bedaŭrinde ankoraŭ ne en ĉiuj). La organiza strukturo, kiu faris la laboron, konsistis dum jaroj el aro da bonvolemuloj ĉirkaŭ Hans, kaj el aro da donacantoj al Fondaĵo Afriko de UEA. Tio estas ege grava aspekto, kiun oni ne rajtas forgesi: rilate al Esperanto ĉiu movo en Afriko eblas nur se troviĝas eksterafrikanoj, kiuj ĝin subtenas finance.

Antaŭ kelkaj jaroj ekestis oficejo en Lomeo (Togolando), kiun la komisiito de UEA funkciigis per mono el la Fondaĵo Afriko. Kiam la laboro pliiĝis, oni petis de pluraj flankoj, ke UEA transformu tion al vera Afrika Oficejo de UEA. Ĉu surprize aŭ ne UEA rezistis dum iom da tempo kontraŭ tro rapidaj movoj, sed fine ĝi devis kapitulaci kaj la laborantoj en la oficejo en Lomeo trovis sian lokon en la buĝeto de UEA, aprobata de la Komitato. Tio ankoraŭ ne estis plena plenumo de la deziroj, ke UEA havu sian oficejon en Afriko. Finfine, en la fino de 2005 UEA ekhavis oficejon, kiu estu parto de la oficejaro, kiu agas laŭ gvidlinioj de kaj respondecas al la Ĝenerala Direktoro.

La agado daŭras kiel antaŭe. Nenio nova sub la (afrika) suno, ni povas diri. La oficejo helpas informi neesperantistojn, instrui ilin pri Esperanto, kaj krei homajn rilatojn, grupojn, landajn asociojn. Ĝi helpos per materialo kaj per konsiloj, kaj, en malmultaj kazoj kaj laŭ la ebloj, ankaŭ per financa subteno de projektoj konsiderataj indaj je realigo, inter ili ankaŭ E-kursoj plurnivelaj. Ĉi tiu verko mem naskiĝas surbaze de la antaŭaj studoj de la verkinto pro la bezono havi tekston uzeblan en kursoj por eduki estontajn instruistojn de Esperanto en Afriko.

En la funkcio de gvidado kaj konsilado ĉefe rolos la Afrika Komisiono de UEA, konsistanta komplete el afrikanoj, kaj nomumata de la estraro de UEA.

Do, esence oni povas vidi la evoluon: de eŭropanoj loĝantaj en Afriko, kiuj zorgas pri Esperanto, nun temas pri afrikanoj, pri afrikaj esperantistoj, kiuj funkciigas la movadon ĉe si. Restis nur la eŭropa subteno, kiu ne estos forigebla dum la ekonomia nivelo de Afriko restos malalta. Dum la lastatempaj Mondaj Sociaj Forumoj en Bamako (Malio) kaj Najrobo (Kenjo) estis agrable vidi, ke afrikaj esperantistoj klarigas al eŭropaj partoprenantoj, ke la internacia lingvo ne estas la angla aŭ la franca sed Esperanto. Bela venĝo kontraŭ tiuj, kiuj riproĉas al Esperanto ĝian troan eŭropecon.

Renato Corsetti
Romo, februaro 2007

Antaŭparolo

Printempe 1998 mi decidis elekti la Esperanto-movadon en Afriko kiel temon por mia disertacio, t. e. finverkaĵo por miaj licenciaj studoj pri la fako 'Afrikaj Lingvoj kaj Kulturoj' ĉe la Universitato de Gento, Belgio. Post literatura kaj surloka esplorado, la verkaĵo pretis en majo 1999[1]. Destinite ne al esperantistoj sed al sciencistoj kiuj okupiĝas pri Afriko, ĝi konsistas el tri partoj: historia kaj lingvika skizo de Esperanto, historia studo pri la movado en Afriko de la komenco ĝis la Afrikaj Kongresoj, kaj pli detala studo pri la modernaj Esperanto-movadoj en Tanzanio kaj Togolando ĝis aprilo 1999[2].

Tiu ĉi verko baziĝas sur la dua parto de tiu disertacio. 'Baziĝas', ĉar okazis ne nur la necesaj korektoj kaj adaptoj por Esperanta publiko sed ankaŭ multaj aldonoj, precipe en la unua parto, en kiu mi traktas ne nur pli da landoj kompare kun la disertacio, sed ankaŭ uzis plurajn aldonajn fontojn. Plie, aldoniĝis, kie necese, klarigoj pri la politika historio de Afriko[3]. Mi provis limigi ĉi tiujn informojn, por ne tro devojiĝi de la temo.

Tamen, same kiel aliaj similaj verkaĵoj, ankaŭ ĉi tiu ne pretendas esti kompleta. Unue, substrekendas ke la periodo pri kiu okupiĝas la disertacio ne ŝanĝiĝis: pro manko de spaco kaj tempo mi ne ĝisdatigis la informojn. Pro la sama kialo ankaŭ ne eblis detale priskribi la modernan movadon en ĉiu lando aparte, kaj la ĝenerala superrigardo estas limigita al la movado en Nigra Afriko, neglektante Nordan kaj Sud-Afrikon. Alia limigo estas la fontoj, rilate periodaĵojn: krom lokaj klubaj revuoj, ili plejparte ligiĝas al UEA. Mi tamen esperas ke ĉiu afrika esperantisto kaj ĉiu esperantisto interesiĝanta pri la afrika Esperanto-movado trovos ne nur atentokaptajn kaj interesajn sed ankaŭ pensigajn kaj entuziasmigajn informojn en ĝi.

Por fini, mi kaptas la okazon danki Renato Corsetti kaj Osmo Buller, pro ilia instigo kaj pro la ŝanco donita al mi publikigi ĉi tiun verkon; Ionel Oneţ pro grandega, ĉiuflanka helpo, apogo kaj instigo; Rob Moerbeek pro multaj valoraj informoj, esplorado en la Biblioteko

Hodler kaj provlegado; Roy McCoy pro tekstprilaboro, skanado de la fotoj kaj enpaĝigo. Sen ĉi tiuj homoj la publikiĝo de la verko kiun vi tenas en la manoj ne estus ebla. Evidentas tamen ke la respondeco de la verko kuŝas ĉe la aŭtoro, kiu bonvenigas viajn reagojn kaj komentojn.

Heidi Goes
Bruĝo, februaro 2007

Klarigo pri geografiaj kaj personaj nomoj

Ni aldonis la modernan nomon de la lando, resp. urbo, kiam temas pri kolonitempa nomo. La modernaj nomoj de landoj aperas tiel kiel ili aperas en la Jarlibro de UEA, kompreneble escepte kiam ili estas parto de citaĵoj, kie ni konservis ilin kiel en la fonto. Ankaŭ la nomoj de lingvoj estas laŭ la kutimo de UEA.

Pri urbonomoj estas iom malpli facile, precipe pro tio ke ofte ili aperas malsammaniere en malsamaj fontoj – aŭ pro eraroj, aŭ pro malsamaj esperantigoj, aŭ simple pro tio ke la aŭtoroj uzis formojn en malsamaj naciaj lingvoj. Kiam temas pri nemulte konataj urboj, estis foje malfacile trovi la ĝustan nomon. Kiam eblis certiĝi pri la ĝusta nomo, nur tiu estas uzita, krom en citaĵoj. Se ne troveblis pri kiu urbo fakte temas, ni aldonis la probablan nomon al la originala nomo. Foje esperantigitaj urbonomoj estas uzitaj, principe nur tiam kiam ili estas jam sufiĉe konataj kaj kompreneblaj. Tie kie povis ekesti dubo pri tio, ni aldonis ĉe la unua uzo la esperantigitan nomon inter krampoj, kaj uzis tiun en la cetero de la teksto. Por urboj kiuj ne havas esperantigitan nomon, aperas la nomo en loka lingvo.

Certagrade estas la sama problemo pri personaj nomoj: plejparte estis malsamaj skribmanieroj pro eraroj. Kiam ni povis certiĝi pri la ĝusta nomo, nur tiu aperas. Se tio ne eblis, aŭ kiam temis pri erara ortografio de aŭtornomo, aperas ambaŭ ortografioj.

Uzitaj mallongigoj

E	Esperanto
EdE	Enciklopedio de Esperanto
EEA	Egipta Esperanto-Asocio
e-isto	esperantisto
ESTE	Esperanta Societo de Tenerife
GEM	Ganaa Esperanto-Movado
ICK	Internacia Centra Komitato
IEL	Internacia Esperanto-Ligo
inkl.	inkluzive
KEL	Krestomatio de Esperanta Literaturo
ktp	kaj tiel plu
JL	Jarlibro(j)
MEA	Maroka Esperanto-Asocio
Ms.	Manuskripto
p.	paĝo
pers. kom.	persona(j) komunikaĵo(j)
RE	Revuo Esperanto
red.	redaktoro
resp.	respektive
SPPE	Societo por la Propagando de Esperanto
t.e.	tio estas
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TIETo	Tietti-Instituto de Esperanto en Togolando
t.n.	tiel nomata(j)
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso
Unesko	Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj
UTE	Unuiĝo Togolanda por Esperanto
v.	vidu
YMCA	Young Men's Christian Association
YMMA	Young Men's Moslem Association
YWCA	Young Women's Christian Association

1. La unuaj paŝoj de Esperanto en Afriko

Enkonduko

Estas ĝenerale konate ke la intelekta fono de la lingvo kaj la komenco de la strukturiĝado de la Esperanto-movado situas komplete en Eŭropo. Certe je la plej alta nivelo oni nur malmulte[4] pensis pri strukturita vastigo al Afriko aŭ alia kontinento. Tial estas malfacile trovi informojn pri la unua konatiĝo de Esperanto al Afriko. En *Krestomatio de Esperanta Literaturo – Tekstoj, dataro, bibliografio, Vol I-III* (Szerdahelyi 1979-82)[5], kiu disponigas tekstojn, datojn kaj bibliografiojn pri la periodo ĝis la unua mondmilito, el la 1267 paĝoj nur apenaŭ kvar temas pri Afriko. Ankaŭ en *Enciklopedio de Esperanto* (Kökény & Bleier 1933-34)[6] nur kelkaj afrikaj landoj estas menciitaj kun siaj unuaj pioniroj. Krome ankaŭ la Jarlibroj[7] de Societo por la Propagando de Esperanto (SPPE), Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Internacia Esperanto-Ligo (IEL) donas informerojn pri la agado en la afrikaj landoj.

Tiuj ĉi malabundaj informoj tamen tuj montras ke la unuaj esperantistoj en la kontinento estis blankuloj, foje kolonisoldatoj aŭ -oficiroj, ofte koloniantoj, ekz. ĉiuspecaj oficistoj, inĝenieroj, komercistoj, kuracistoj, instruistoj, misiistoj ktp. Escepte de kelkaj kazoj, el kiuj la plej gravaj estas Sud-Afriko kaj Madagaskaro, precipe nord-afrikaj landoj estas menciitaj en tiuj plej fruaj fontoj. La fakto ke Esperanto havis jam firman pozicion en Francio kontribuis al ĝia disvastiĝo en la francaj kolonioj.

Unu el la plej fruaj statistikoj pri la nombro de UEA-membroj en la mondo, kiu menciis landojn en Afriko, aperis en 1912 en la revuo *Esperanto*[8]. Tiu ĉi statistiko konsistis el du partoj, unu por la distrikta distribuo, kaj unu por la landa distribuo. En la unua parto, Norda kaj Suda Afriko estas menciitaj kun respektive 17 kaj 37 membroj. Tio rezultigas ke en la parto pri landoj, kvankam kontinento, Afriko aperas kun 54 UEA-membroj. Tio ĉi estis iom malpli ol en la antaŭa jaro (1911), kiam estis tie 60. La diferenco estas komplete alkalkulebla al Norda Afriko (RE 1912 8/13: 205).

En 1913 estis membroj de UEA en Sud-Afriko, kaj krome en kvar landoj de Norda Afriko: Alĝerio, Egiptio, Maroko kaj Tunizio. Sekvajare aldoniĝas multaj membroj en Sud-Afriko kaj po unu en Okcidenta Afriko kaj en Sudano (v. tabelon 1). Evidentiĝas ke en 1914 duono de la membroj en Afriko troviĝis en Sud-Afriko (RE 1914 10/13: 211).

Tabelo 1: Laŭlanda nombro de UEA-membroj en 1913 kaj 1914

Lando [9]	*1913*	*1914*
Alĝerio	1	4
Egiptujo	8	29
Maroko	2	6
Sudano	–	1
Tunizio	4	3
Okcidenta Afriko	–	1
Sud-Afriko	10	44
Tute	25	88

Alia valora fonto estas la statistiko, kiun la germana profesoro Johannes Dietterle faris por la Internacia Centra Komitato. La statistiko estis la unua pli kompleksa provo, "unua eksperimento" [emfazo en la originalo] nombri la esperantistojn. La unua alvoko al la tutmonda esperantistaro havigi la informojn por nombrado de "nia popolo" publikiĝis en oktobro 1926 en *Esperanto* (Dietterle 1926: 185-187). Post dua (marto 1927 – Dietterle 1927a: 60) kaj tria kaj lasta alvoko (oktobro-novembro 1927 – Dietterle 1927b: 191-192), la nekompleta (kaj neniam kompletigota) statistiko estis publikigita en *Esperanto,* en julio-aŭgusto 1928 (Dietterle 1928: 134-156). La donitaĵoj estis do kolektitaj ekde fine de 1926 ĝis meze de 1928.

En la statistiko, la landoj estas listigitaj en alfabeta ordo laŭ kontinento (vidu, por la afrika parto, tabelon 2) kaj estas donitaj respondoj en cifera formo al la jenaj dek demandoj:

I. En kiom da lokoj [urboj aŭ vilaĝoj] ekzistas Esperantistoj?
II. Kiom da grupoj ekzistas entute?
III. Kiom el ili estas 'fakaj' grupoj?
IV. Kiom de la grupoj kalkulitaj sub II. ne respondis?
V. Kiom da anoj apartenas al la grupoj [en 1926]?
VI. Kiom da izole vivantaj Esperantistoj ekzistas en lokoj, kie ne estas grupo?
VII. Kiom da Esperantistoj ekzistas ekster la grupoj en la lokoj, kie estas grupoj?
VIII. Kiom da kursoj okazis en la grupoj (nur tie! ne en lernejoj k.t.p.) dum 1926?
XI. Kiom da kursoj okazis entute dum la lastaj jaroj laŭ la raportoj de la grupoj?
X. Kiom da grupoj havas Esperanto-bibliotekon?

La plej gravaj demandoj por Afriko estas tiuj pri la nombro de lokoj kie estas esperantistoj (I), kiom da grupoj (II) kun kiom da membroj (V) kaj kiom da izolite vivantaj esperantistoj tie ekzistas (VI). Tiuj ĉi lokoj/urboj estas listigitaj, kun signo ĉe la urbonomo en kiu estas klubo.

Krom demando V, kiu nur en la unua kaj tria alvoko enhavas la jardaton 1926[10], kaj demando VIII, kiu enhavas jardaton ankaŭ en la lasta listo de demandoj (ĉe la publikigo de la statistiko), la demandoj ne enhavas jardaton. Pro tio ni ne povas certiĝi pri la ekzakta jaro al kiu rilatas la respondoj al tiuj ceteraj demandoj. Tial uzante ciferojn el la statistiko, ni ne aldonas ekzaktan jardaton, escepte kiam temas pri la nombro de membroj en la grupo: tiam ni aldonis [en 1926], aŭ kiam temas pri la nombro de kursoj, ĉar tie eblas esti certa pri la jaro 1926.

Tabelo 2: Dietterle-statistiko[11]: afrika parto (Dietterle 1928: 138)

Landoj	*Demandoj*									
	I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII	IX	X
Abisenujo (Etiopio)	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Acoroj insul.	4	–	–	–	–	6	–	–	–	–
Alĝerio	5	–	–	–	–	26	–	–	–	–
Angolo	6	–	–	–	–	10	–	–	–	–
Egiptujo	6	1	–	–	15	89	–	2	2	–
Ebur–bordo	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Fernando–Po[12]	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Gvineo hisp.[13]	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Kanariaj insul.	3	2	–	2	16	9	–	–	–	–
Kaplando (Kablando[14])	4	–	–	–	–	5	–	–	–	–
Kapverdaj insul.	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Kongo belga (D.R.Kongo)	5	–	–	–	–	5	–	–	–	–
Kongo port.[15]	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Liberio	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Libio	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Madagaskaro	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Maroko	10	1	–	–	16	16	8	2	4	–
Maŭricio	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Natalo[16]	1	–	–	–	–	4	–	–	–	–
Nigerio (Niĝerio)	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Ora Bordo (Ganao)	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Oranĵo–ŝtato[17]	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Orient–Afriko portug. (Mozambiko)	2	1	–	–	5	1	–	–	–	–
Rodezio[18]	3	–	–	–	–	4	–	–	–	–
Somali–bordo itala[19]	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
St. Heleno	1	–	–	–	–	4	–	–	–	–
St. Tomaso (nun Sao–Tomeo kaj Principeo)	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Sudano fr.[20] (Malio)	1	–	–	–	–	1	–	–	–	–
Transvalo[21]	7	1	–	–	32	15	–	12	12	–
Tunizio	4	–	–	–	–	4	–	–	–	–

1.1. Norda Afriko

1.1.1. Alĝerio

Krestomatio de Esperanta Literaturo kaj *Enciklopedio de Esperanto* kontraŭdiras unu la alian nomante kaj datante la unuajn esperantistojn en tiu ĉi lando. Laŭ KEL (p.435) tiuj ĉi estis André Lardet en 1896 en Bordj-bou-Arréridj, Ch. Claizerguez en Rio Salado kaj E. Gard en Mostaganem (Oran) en 1898, Paul Décor en Oran kaj A. Rivier en Alĝero en 1899. El tiuj ĉi kvin nur la lastaj du estas menciitaj en EdE (p.17). Paul Decor jam aperas kiel Delegito en Oran en la Jarlibroj de SPPE de 1899-1900 ĝis 1903. Ekde 1901-02 aldoniĝas E. Uzannaz en Oran kaj A. Rivier en Alĝero, kaj en 1903 Auguste Capé-Montrosier kaj Deshayes en Alĝero kaj Gaston Fenech en Philippeville. Ankaŭ en KEL (p.435) kaj en EdE (p.17) estas menciita kapitano Auguste Capé-Montrosier, kiu en 1903 komencis fari "neordinare viglan propagandon per artikoloj kaj paroladoj" (EdE p.17). Kun H. Tarry li fondis samjare la unuan Esperanto-grupon en Alĝero, kiu en tempodaŭro de ses semajnoj povis "honoranime" enskribi 122 membrojn, inter kiuj estis la prefekto kaj la urbestro de Alĝero kaj aliaj altranguloj. Propagandaj artikoloj aperis interalie en *La Nouvelliste d'Alger*, *Les Nouvelles* kaj *La Dépêche Algérienne*, per kio Esperanto estis favore lumigata en Alĝerio kaj eĉ ĝis trans la limo en Tunizio (EdE p.17; JL de UEA 1937).


Auguste Capé-Montrosier

Post speciala peto de Capé-Montrosier la franca ministro pri milito permesis al la oficiroj aliĝi al Esperanto-grupo. Marte de 1904 la Esperanto-grupo jam havis 283 membrojn. En tiu sama jaro Capé-Montrosier entreprenis porpropagandan vojaĝon tra la lando, kio vekis la intereson "eĉ de italaj kaj hispanaj kolonian[t]oj" (EdE p.17). Dum la jaroj 1904-05, la klubo eldonis revuon, *Turko Revue*, kiu havis konstantan rubrikon nomatan *Esperanto*

Revue (KEL p.436). EdE (p.17) nomas ĝin *Turco-Revue* kaj implicite komprenigas ke ĝi tute konsistis el propagando por Esperanto. Ĉar Capé-Montrosier devis reiri Francion, Bresson transprenis la prezidantecon (EdE p.17).

Auguste Capé-Montrosier iniciatis (laŭ KEL p.435 kaj EdE p.80), kaj Barthélemy Bals kaj Louis Landes fondis (*La Alĝeria Stelo* 1905 1/12: 1) la dulingvan revueton *La Alĝera Stelo – L'Étoile Algérienne*, kiu aperadis ĉiun duan semajnon ekde la 20a de februaro 1905 (sed dum la plej varmaj monatoj, de julio ĝis septembro 1905, nur monate – *La Alĝeria Stelo* 1905 1/9: 1). Ĝi havis kiel subtitolon *Petite Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord*. La revuo estis "konsekvenco de l'nombro senĉese kreskanta de l'Alĝeriaj Esperantistoj". Celoj estis unuigi esperantistojn el diversaj grupoj, kaj "…diskonigi Alĝerion kaj ĝian bluan ĉielon, ĝiajn vidindaĵojn kaj pejzaĵojn [tiel] k.t.p.…" (*La Alĝera Stelo* 1905 1/1: 2). Ankaŭ pluraj aliaj frazoj aŭ frazpartoj atestas pri tio ke granda parto de la legantaro estis koloniantoj, ekz. "…la seninterrompa laboro de ĝiaj [de Norda Afriko] kolonian[t]oj, sekvinte la heroismon de la militistaroj, kiuj donis al Francujo tiun mirindegan plilongigaĵon…" (Capé 1905: 2) kaj "…nian belan kolonion…" (*La Alĝera Stelo* 1905 1/1: 3).



UNIVERSALA ESPERANTIA BIBLIOTEKO

1re Année — Lundi 5 Juin 1905 — N° 8

5 Centimes — LA ALĜERIA STELO — 5 Centimoj

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-HEBDOMADAIRE — ★★★ — DUSONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel: Algérie, Tunisie ..... 2 fr. — Pâtrie ..... 2 fr. 50 — Etranger ..... 3 fr.

Kosto de la Jara Abono: Alĝerujo, Tunisujo ..... 2 fr. — Pâtrujo ..... 2 fr. 50 — Eksterlanduj landoj ..... 3 fr.

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, Alger. Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR: Barthélemy BALS — ADMINISTRATEUR: Louis LANDES

La Annoncoj estas ricevataj al la Administrato de la Journalo, 57, rue d'Isly, Alger. Prezoj laŭ peto

KVITAJ (Anekdoto)

Por kunhelpi al la sukceso de tiu ĵi revueto kaj, tiel, daŭrigi propagandi por la lingvo Esperanto, mi sendis al multaj ĉiulandaj gekorespondantoj ekzemplerojn de ĝi, kiujn mi ricevis de l' redakcio.

Kelkaj el tiuj korespondantoj bonvolis aboni, aliaj petas sankulpon ĉar tion ili ne povas fari pro tiu aŭ alia rato, tiuj atestis min dankis. Multaj el ili risendinte interlanĝe, esperantajn revojn al sia lando (pro kio mi aliavice tre dankas ilin.) Tio al mi memorigis la sercan fakton lenan:

Dum mia junaĝo (tiloca tempo jam iom malpreksime) mi aliĝis al muzika societo, kredeblas al ni ĝiaj, ĉu ne iom karaj ingantoj? Mi malpli, iam ĉiuj mi klonis en ian muzikinstrumenton.

Tiu muzikaro havis kutimon, antaŭtage nomfeston de tiu el siaj anoj, alfari serenadon antaŭ la domo de l' festato.

Tiu ĉi, tiam zorge antaŭaviginta, ĝojo ekaperis ĉe l' fenestro, post malsuprenirinte li peris, ke ni eniru en lian loĝejon kie, kantante, deklamante, muzikante, kriante, kaj precipe ridegante, oni trinkis kaj rerimis ĉiuspecain trinkaĵojn meze de tiu bruo pigrandiĝita per eksploduroj de l' korkoj de campano.

Ian tagon, atinteni la festo de nia nova cimbalisto, malfiana ĥaŭlo, ekrigana oficisto, bonvivulo tiam gaja kaj kontenta. La muzikaro serbiran antaŭenirras ĝis la domo kaj, — unu, du, tri, kvar — subite ekstonegas en la nokto: muzika kaj kuprasona ĉeĥo.

Nia amiko nur vestita per noktaj ĉemizo kaj kapreseto tuje malfermas sian fenestron, kie li aperas kun surpriza mieno; kaj tuj kiam la arto estis finita, li ekprotestas sian cimbalisto: — Kaj, kial ne ankaŭ ne rapidegaj batoj unu kontraŭ la aliaŭ, dăim, dăim-dăim-dăim-dăim-dăim, dăim, dăim-dăim-dăim..., dăim, dăim... fine hasoj ka, ne ŝnigente al mi, li ekkriis fortavoĉe: « Nune, ni estas kvitaj » kaj li rapidis reformensa vizaĝo al fenestraĵo kovrilojn.

La bruega ridsaplodo kiu daŭris de l' tempo kiam komencis tiu ridinda sceno tuj ekpigrandiĝaĝis ĉe l' fenestro de l' ĉirkaŭaĵo, kie troviĝis amaso da loĝantoj, sed iom post iom ĝi haltis malsupre, kie la muzikantoj bone atendis ian neeviteban sencon, sed ne tiel tutan mistifikaĵon.

Sola, nia tamburisto, ekstregimentambulisto dirinkentulo enradikita kaj portisto kiam li povis, ne malenperis, certiĝanta ke li ekjuntis tin bodiaŭ du korbojn da campano al nia kolego. Tial la situacio daŭris lanco, ; ekdonas perfortan ŝultrobaŝon al la gordo, kiu malfermiĝis sen la malcelo: kaj tiam okazis vera enpenetrado en la domon de l' cimbalisto.

Sed, kia ĝuiĝa surpriĝo kiam supreniriniro ni ekvidis grandan manĝoablon larĝitan de luminaĵoj, de floroj, de multegaj frandaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj sur la sojlo nian amikon, korektre frakvestita kiu, tuje ridetante, amikeje ricevis nin en sian hejmon.

Do, la vesperkunveno, aŝ pli ĝuste la noktkunveno, bonege finiĝis, sed longe tempe oni ridadis, ofteje ripetante: « Nune, ni estas kvitaj. » Vi vidas, ke nuntempo, oni ĝin ne ankoraŭ forgesis.

A. BAISSAC.

La Alĝeria Stelo, n-ro 8, 5a de junio 1905

Post la unua aŭ dua numero, la nomo estis ŝanĝita al *La Alĝeria Stelo* (1905 1/3: 1). La redakcio estis decidinta ke la titolo de la ĵurnalo aludu al la nomo de la lando, Alĝerio, kaj ne al tiu de la urbo, Alĝero (*La Alĝeria Stelo* 1905 1/11: 4). Ekde la dua jaro de ĝia publikado, 1906, la revuo fariĝis la oficiala organo de la Grupo Esperantista de Alĝero

(*La Alĝeria Stelo* 1905 1/18: 1), kaj ekhavis alian subtitolon: *Duonmonata Oficiala Organo de la Grupo Esperantista de Alĝero kaj de la Nordafriko* (*La Alĝeria Stelo* 2/1: 1). Ekde majo 1906 ĝi aperadis nur monate (*La Alĝeria Stelo* 1906: 2/9: 71). La lasta numero aperis en septembro 1906 (KEL p.436).

De la 15a ĝis 17a de aprilo 1905 okazis granda Esperanto-ekspozicio en Alĝero, kies sojlon transpasis pli ol kvar mil vizitantoj (EdE p.17; Landes 1905a: 1). En decembro 1905 fondiĝis "Alĝera Esperantista Laboristaro" en Alĝero. La laborista grupo tenis kontaktojn kun anglaj laboristoj pri la fondo de gazeto, kiu defendu la internaciajn interesojn de la proletaro (*La Alĝeria Stelo* 1906 2/3: 19-20; EdE p.17). Laŭ EdE (p.17) post tio, tiu ĉi vigla movado kolapsis. KEL (p.436) mencias aldone du aliajn revuetojn, kiuj aperis tre efemere, nome *Afrika Esperantisto*, kiu estis eldonata monate, de majo 1907 ĝis februaro 1908 en Alĝero, kaj *Alĝeria Informilo*. La intenco de tiu ĉi lasta estis ke ĝi, kiel semajna gazeto, aperu ĉiun ĵaŭdon en Esperanto kaj en la franca, sed de ĝi aperis neniam pli ol unu numero. Ankaŭ laŭ tabelo 1 (v. la enkondukon) en tiuj ĉi jaroj ne estas multaj esperantistoj en Alĝerio. Tamen en la Jarlibro de UEA 1913 aperas la "Grupo Esperanta de Alger kaj de norda Afriko" en Sidi-Bel-Abbes. En *Esperanto* (1921 17/6: 117) aperis mencio pri tri Esperanto-kursoj.

Laŭ la statistiko de Dietterle estis esperantistoj en kvin urboj. Temas pri Ain-Beida, Alĝero, Konstantino, Philippeville kaj Relizane. Tie vivis entute 26 esperantistoj, sed plu neniu organizita grupo. La raporto de la Internacia Centra Komitato de 1931 atentigis pri tio ke en Alĝerio ja loĝas izolitaj esperantistoj, sed ke ilia helpo al la movado ofte estas nur portempa, pro tio ke ili, estante koloni-oficiroj, ofte post unu jaro jam forlasas la landon (EdE p.17). En 1933 estis UEA-delegitoj en Alĝero, Phillippeville, Sétif kaj Konstantino. En la Jarlibro de UEA de 1935 menciiĝas la "Esperantista Grupo de Philippeville", kun kunvenoj dufoje semajne.

EdE (p.17) dediĉis unu frazeton al la "indiĝenoj", el kiuj tiuj lernintaj Esperanton prefere aliĝis al SAT pro ties ĉi "politika orientado", ol al UEA. Tamen la nomoj de la personoj listigitaj en la Jarlibroj de SAT (1932, 1933-34 kaj 1939) ne aspektas arabaj, sed francaj.

La *Tutmonda Adresaro de la Esperantistaro* pri la jaro 1938 mencias sub Alĝerio dek naŭ esperantistojn kaj kvin E-grupojn, inter ili du, "Paca Rondo" kaj "Ĉiam antaŭen", en Alĝero (Steiner 1938: 104). Tamen, en 1947 restas el tiuj nur kvar esperantistoj kaj neniu grupo (Steiner 1947: 107).

1.1.2. Egiptio kaj Sudano[22]

Ankaŭ tie ĉi KEL (p.436) mencias unu pioniron pli ol EdE (p.116), nome Nicolas A. Vatimbella en 1894 en Ramleh. Ambaŭ mencias A. Piolet en Ismailia kaj Robert Laussac kaj René Japiot en Aleksandrio en 1901. Artikoloj verkitaj de tiu ĉi lasta aperis en *La Correspondence Egyptienne illustrée* (EdE p.116). En 1908 alia pioniro, Abu Fadie, gvidis Esperanto-kursojn en Kartumo, Sudano (EdE p.116). Li estis ankaŭ la unua UEA-Subdelegito en la sama urbo en 1909 (JL de UEA 1909).

Egizio Veronesi, prezidanto de la Teozofia Societo en Egiptio, kaj Atkins, ambaŭ en Kairo, G. Lee en Kartumo, Georges S. Georges en Ĝebel Moya, H. Sipek en Heluan kaj G. Wilken en Aleksandrio estis "enportistoj de Esperanto Egipton [tiel] – komence de 1909" (Modan 2005 48/1: 13; *La Egipta Esperantisto* 1922 1/1: 6). Ili starigis servojn de UEA kiuj regule funkciis. Fondiĝis esperantistaj grupetoj apud Delegitoj kaj "oni decidis do fondi nacian Societon kaj EEA [= Egipta Esperanto-Asocio] estis kreita kiel Egipta Nacia Societo, konsistanta el apartaj diversurbaj grupoj". *La Egipta Esperantisto* (1922 1/1: 6) ne mencias daton pri tiu ĉi fondo, sed laŭ la Jarlibro de UEA 1928 kaj la Jubilea Jarlibro de UEA 1937 la unua tutlanda federacio fondiĝis en Kairo en 1911[23]. Oni komencis vigle propagandi, G. Lee ekaperigis malgrandan *Egiptan Bultenon*, kaj ĉio estis sur la bona vojo. Sed subite komenciĝis la milito, esperantistoj foriris al Eŭropo kaj la agado en Egiptio preskaŭ estingiĝis.

En 1921 Jakob A. Benŝaĥar, egiptia hebreo, kaj G. Wilken provis kune revivigi la movadon en Egiptio (*La Egipta Esperantisto* 1922 1/1: 6; EdE p.47). Ili anoncis paroladon pri universala lingvo en Aleksandrio kaj "la dato de tiu parolado, – [la] 2[a] de Aprilo 1921 – devas esti konsiderata kiel naskiĝdato de nuna E.E.A." (*La Egipta Esperantisto* 1922 1/1: 7). Laŭ Lapenna (1974: 503-4) Egipta Esperanto-Asocio fondiĝis en 1922 kaj trovis membrojn



EGIPTA ESPERANTO ASOCIO.

KAIRO EGIPTUJO.

LA EGIPTA ESPERANTISTO

Organo de la Egipta Esperanto Movado

(((P.K. No: 450 Kairo - Egiptujo)))

NO: 20

JULIO KAJ AUGUSTO 1949

E S P E R A N T O
ESTAS INTERKOMPRENILO

Iom da interkomprenigo aliformigas la sekogan toron al verda kaj frukta paradizo; ŝanĝas la akraĵn poniĝajn dornojn al freŝaj ridetaj floroj; kaj la maldiligentajn manoj al laboremaj liaj.

Iom da interkomprenigo rogas la kolorma-jn homojn kaj la malsanajn korojn; purigas la animon kaj vokigas la konsolotoron; etendas la eternan paĉon kaj la vastan kvieton sur la mondo.

Iom da interkomprenigo aliformigas la kruelecon al bonseco; maldolĉatoŝon al ĉentileco; la malamon al nobleco; la egoismon al kunhelpo, kaj la tiranon al pura anĝelo.

La interkomprenigo estas la voĉo de la idealo moreala mondo. La ESPERANTO gvidas vin al tiu voĉo, la voĉo ĵo la paradizo, kio la popolo devenas bonaj anĝeloj.

(Musa Holmi)

الاسبرانتو
وسيلة التفاهم

قليل من التفاهم يحول الأرض الخضلة الى نجنة نضرة زاهرة يحول الأشواك القاسية الحامية الى زهور وادعة باسمة يحول الأيدى العاطلة الى أيد عاملة .

قليل من التفاهم يمسح الدنوس القاترة والقلوب الحالمة ويهدب الوجد ان وحشى الضمير ويسدد على العالم السلام والدائم والهدوء الشامل .

قليل من التفاهم يحول القسوة الى حنان والسلطة الى رقة والحقد الى تسامح والانرة الى تعاون والانسان الظالم الى ملاك باسم طاهر .

التفاهم هو الطريق الى عالم المعنى المثالى . الأسبرانتو يشق لكم هذا الطريق ويمهد الى الجنة تصبح الشعوب ذا اطابع ملائكى كريم . !

(موسى حلمى)

ĈIAM PAROLU ESPERANTE

La uzado de nacia lingvo inter esperantistoj devas esti konsiderata kiel grava peko. Kaj kiam ni estas devigataj uzi nacian lingvon, tiam ni ne forgesu, ke por tio ni kvazaŭ onglutas iom de la veneno kiu malsanigas la homaron.

LA FASTO DE RAMADAN :

Okaze de la granda Fasto de Ramadan, ni sendas niajn bondezirojn al niaj vutmondaj Islamaj gesamideanoj.

KIAM NIA STATO FAROS LA SAMAN ???

Laŭ la Svedo-Organo "EN ESPERO", La Sveda Registaro asignis la sumo de 1800 Sv.Kr.(= £120) al Sveda Esperanto Instituto por ke ĝi povu sendi Reprezentantojn al la Universala Kongreso de Esperanto en Bournemouth (Anglujo).

ARTIKOLOJ KAJ NOVAĴOJ DE NIAJ GELEGANTOJ ESTAS BONVENIGATAJ.

La Egipta Esperantisto, n-ro 20, jul.-aŭg. 1949

unuavice inter eŭropanoj. La unua revuo, *La Egipta Esperantisto,* aperis en decembro 1921, en Aleksandrio, sub la redaktado de G. Wilken, en Esperanto, en la franca kaj en la itala (KEL p.436). Laŭ niaj eltrovoj la unua numero efektive aperis en januaro 1922, kaj la revuo ĉesis aperi en marto samjare. En la februara numero aperis alvoko ‘Al la Afrika Esperantistaro’, en kiu la redakcio esprimas sian deziron ke la revuo iĝu presorgano de la tutafrika esperantistaro, ĝis la movado estos sufiĉe vigla por ebligi aperigon de aliaj revuoj aŭ gazetoj en Afriko, kaj invitas ĉiujn afrikanojn al kunlaborado (*La Egipta Esperantisto* 1922 1/2: 14).

Ke la esperantistoj en Egiptio en tiu ĉi periodo faris relative multan propagandon, kiu efikis ankaŭ al araboj, pruvas ankaŭ la – kvankam tre mallongaj – informoj pri tio en la revuo *Esperanto*. En ‘Tra la Mondo Esperantista’ kaj ‘Kroniko’ (rubrikoj kun novaĵoj pri la diversaj landoj) troviĝas en la jaroj 1920aj sub Afriko nur nordafrikaj landoj, kaj tiukaze precipe Egiptio. Tiel troviĝas en *Esperanto* (1921 17/11: 191) komuniko pri porpropaganda kunveno kiun 200 personoj ĉeestis. *Esperanto* (1927 23/3: 61) sciigis ke en la urbo Tanta, meze de la Nila Delto, s-ino Nikolaides propagandas. En Kairo la “arablingva ĵurnalo *Al Mokattam* regule raportas pri nia afero”. Daŭre en la sama numero de *Esperanto* oni sciigis interalie ankaŭ ke en Port Said estas nova grupo kun kiel Prezidanto M. Mustafa. Okazis kurso ĉe bahaanoj. En la sekva jaro, 1928, la klubo havis dudek membrojn, el kiuj ĉiuj kiuj estis finintaj sian kurson aliĝis al UEA (RE 1928 24/3: 67). Laŭ EdE (p.116) la grupo faris en 1929

bonegan laboron: pli kaj pli montriĝis la fruktoj de koresponda kurso en araba lingvo.

Ankaŭ el la statistiko de Dietterle montriĝas ke Egiptio havis relative firman pozicion en tiu ĉi periodo. Ĝi raportas pri tiu ĉi lando la plej altan nombron da izolitaj membroj inter ĉiuj afrikaj landoj (nome 89), kaj klubon de dek kvin membroj en Port Said [en 1926]. Esperantistoj estis en ses urboj, nome en Aleksandrio, Kairo, Kair-Zayat, Port Said, Suezo kaj Tanta. La ICK-raporto de 1929 (citita en EdE p.116) mencias ke la movado komencas akiri pli kaj pli palpeblan formon, kion pruvas la regula aperado de propagandaj artikoloj en la enlanda, precipe arablingva gazetaro. La apero de arablingva Esperanto-lernolibro de Amin El-Mofti en Aleksandrio[24] plisimpligis la lernadon de la lingvo (ICK-raporto de 1932, citita en EdE p.16).

La ICK-raporto de 1930 (citita en EdE p.521[25]) mencias ke iu Marin povis kolekti dekon da "indiĝenaj adeptoj". Li ankaŭ sukcesis fari paroladon en la Gordon-Kolegio de Kartumo. Tri jarojn poste troviĝis izolitaj esperantistoj en diversaj lokoj en Sudano. En Atbara estis starigita grupo konsistanta el araboj, sirianoj kaj koptoj (EdE p.521). En la Jarlibro de UEA 1934 aperis sudanaj Delegito (Nabih-Suliman Tahan) kaj Vic-delegito (Taufik Mikhail Girgis) en Atbara.

La 9an de julio 1933, Amin El-Mofti faris paroladon por la membroj de Young Men's Moslem Association (YMMA[26]), en kiu li diris ke "... ĉiu potenca nacio en la mondo volas sian lingvon kiel la internacian; tial ni ankoraŭ ne havas helplingvon universale akceptitan" kaj ke "D-ro L.L. Zamenhof sciis ke ni ne povas akcepti la francan, la anglan aŭ la germanan lingvon kiel la internacian lingvon, do li laboris por fari la novan, simplan kaj belan lingvon, Esperanto" (*La Egipta Espero* 1933 1/2: 5-6). La ICK-raporto de 1933 (citita en EdE p.116), faras mencion ankaŭ pri araba Esperanto-ŝlosilo[27] kaj -faldfolioj, kiuj multe plifaciligis la laboron. En la periodo 1933-35, la brito Leonard N.M. Newell gvidis kurson laŭ la Cseh-metodo en Kairo (EdE p.116; Lapenna 1974: 504).

En la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* de 1938 menciiĝas Egipta Esperantista Ligo, pri kiu ni ne sukcesis trovi pliajn informojn, kaj Egipta Skolta E-rondo, ambaŭ kun Abdu El Suaki kiel kontaktpersono. Krome

menciiĝas dek kvin esperantistoj kaj kvar E-grupoj, resp. en Kairo, Fayum, Ismailia kaj Port Said. Aldone sub Sudano aperas N.S. Tahan en Atbara, kaj Leonard N.M. Newell en Kartumo.

Tadros Megalli, arabo-kopto, kiu lernis Esperanton pere de la koresponda kurso de la E-grupo en Port Said en la jaro 1928, dum la milito instruis ĉe soldata klubo, ĉe Teozofia Societo (kie li trovis multajn librojn kaj gazetojn esperantistajn el la jaroj 1910-1920, apartenintajn al E. Veronesi – v. pli supre), kaj ĉe Young Women's Christian Association (YWCA[28]) (Migalli [= Megalli] Tadros 1946: 3; Modan 2005 48/1: 12-13; Megalli Theo 2003 54/1: 12).

En 1944 EEA estis refondita, inter aliaj de Amin El-Mofti, Musa Helmi kaj Tadros Megalli, kaj per paroladoj en la franca de la judo Cohen, en la araba de Helmi, kaj en la angla de Isaac Nassif. EEA agadis interalie inter soldatoj kaj militkaptitoj. En la sama jaro EEA ekaperigis la bultenon *La Egipta Esperantisto*. La 15an kaj 16an de decembro 1944 okazis la Unua Egipta Esperanto-Kongreso ĉe YWCA en Kairo kun pli ol kvardek partoprenantoj. Pli ol cent anoncitaj partoprenontoj el la Palestina Esperanto-Ligo (PEL) ne povis ĉeesti pro vizoproblemoj (Megalli Tadros 1945: 4; Lapenna 1974: 503-504; Modan 2005 48/1: 14).

Sekvajare okazis ankaŭ la Dua Egipta Esperanto-Kongreso, dum kiu EEA elektis novan estraron, kies membroj estis Amin El-Mofti, Mahrus Nassif, Tadros Megalli, Isaac Perez kaj Isaac Nassif (Migalli [= Megalli] Tadros 1946: 3).

Tadros Megalli

Kiam en oktobro 1947 la usona esperantisto kaj vic-

konsulo John Robertson venis Kairon, lia ĉeesto havis entuziasmigan efikon al la lokaj esperantistoj (Megalli Tadros 1947: 176). Okaze de la 88a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, Tadros Megalli, tiam jam Ĉefdelegito de UEA en Egiptio, prelegis en la araba pri la vivo de Zamenhof dum kunveno de Young Men's Christian Association (YMCA[29]) en Kairo. Preskaŭ ĉiuj 50 ĉeestantoj enskribis sin, post provlecioneto, por la sekva kurso (Megalli Tadros 1948: 20).

En la unuaj monatoj de 1949 novaj kursoj estis organizitaj en Kairo. *Journal d'Egypt[e]* kaj *Images* donis spacon por la Esperanto-movado (RE 1949 42/5: 58). En 1951 la movado denove eksilentis (Lapenna 1974: 504), sed en tiu sama jaro la Mezorienta Esperanto-Federacio estis registrita ĉe la Ministerio de Socialaj Aferoj. Tiu ĉi fondis jam antaŭ majo 1952 sekcion kiu respondecis pri kursoj per korespondado (RE 1952 48/5: 133).

1.1.3. Kanarioj (daŭre hispana insularo)

Laŭ EdE (p.278) en 1905 en Las Palmas la pioniroj estis Alfredo Cabrera, A. Rodriguez Alvarez kaj F. Gonzales Correa, kaj en 1907 en La Laguna S. Ferreira kaj E. Rivero. Laŭ la Jubilea Jarlibro de UEA de 1937, la pioniroj estis: F. Gomes Correa, A. Calrera [tiel – verŝajne temas pri la sama Alfredo Cabrera kiel supre], Arevalo Valles kaj Don Ortega. Laŭ la sama fonto, la unua grupo fondiĝis en Santa Cruz en 1907 (JL de UEA 1937), dum laŭ EdE (p.278), la pioniroj S. Ferreira kaj E. Rivero fondis la unuan grupon same en 1907, sed en La Laguna. Jam en la unua Jarlibro de UEA aperas Delegito (Eladio-Gonzales Rivero) kaj Vicdelegito (José de Miranda y Pulido) en Tenerife (JL de UEA 1908).

La Esperanto-grupo de Las Palmas, "Centro Esp." fondiĝis en 1915 (JL de UEA de 1924 kaj 1933). En 1924 estis Esperanto-grupo en Santa Cruz kiu nomiĝis "Nova Sento" (JL de UEA 1924). La statistiko de Dietterle mencias esperantistojn en tri lokoj, nome en Las Palmas, Puerto de la Luz kaj Santa Cruz de Tenerife, kaj la du grupojn en resp. Las Palmas kaj Santa Cruz. En 1934 jam estas UEA-delegitoj en kvar urboj: Las Palmas (José S. Báez), Santa Cruz de La Palma (Juan Régulo Pérez), Tazacorte (Manuel Paez y Ortiz) kaj Tenerife (Miguel Luque).

Juan Régulo Pérez

De 1945 ĝis fine de 1948, kiam oni tion malpermesis al li, Juan Régulo Pérez gvidis E-kursojn en la universitato de La Laguna, kie li estis helpprofesoro en la Filozofia kaj Beletra Fakultato. En 1952 li fondis la eldonejon Stafeto, kiu dum pli ol 20 jaroj eldonis originalajn kaj tradukitajn verkojn en Esperanto. En 1957 li estis unu el la impulsantoj por krei la Esperantistan Societon de Tenerife. Angel Pombrol Hernández estis ĝia unua Prezidanto (Trujillo 1997).

1.1.4. Libio

En la statistiko de Dietterle menciiĝas unu sola esperantisto en Benghazi. En la sama loko la unua Delegito por la lando aperas en la jaro 1929: Gino Catarzi, kiu kiel mecenato ebligis eldonon de valoraj libroj (JL de UEA 1929 kaj 1937; EdE p.364).

Estis en tiu ĉi lando ke, en 1935, post la 27a UK en Italio, okazis tutsemajna, postkongresa ekskurso. Ĝi estas ĝis nun la sola UK-ero sur la Afrika kontinento (Sikosek 2005: 86). En la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* de 1938 menciiĝas Mario Muretti en Tripolo (Steiner 1938: 107).

1.1.5. Maroko (inkl. de Ceŭto kaj Melilo, v. noton 3)

Laŭ EdE (p.361) la unuaj pioniroj estis francaj oficiroj en 1906. La Jubilea Jarlibro de UEA (1937) mencias kiel pionirojn: J. Grossart en Tanĝero, kaj A. Foradada, J. Baigorri kaj M. Membrillana en Ceŭto. Vincent Claudius Richard lernis Esperanton en 1898, aktivis unue en Eŭropo (ĉefe en Francio, kie li estis Delegito ekde la fondo de UEA, kaj en Svislando), kaj en 1912 ekpropagandis en Tanĝero, donante kursojn (EdE p.465; Jakob 1928: 125). Li kun Jean Sasy en Rabato aperas kiel unuaj Delegitoj en la lando en 1913 (JL UEA 1913). En la sama jaro kapitano

Afiŝo por la 27a UK en Romo en 1935, kun mencio de la “kongresa krozado” al Afriko.

Ferdinand Redondo fondis en Melilo la unuan Esperanto-asocion (EdE p.361). Tio ĉi klarigas probable la relativan plialtiĝon de la nombro de UEA-membroj en 1914 kompare kun 1913 (v. tabelon 1). En la sama jaro aperas la unua Delegito en Melilo, la subkolonelo Eugenio Calvo Blasco. Inter la esperantistoj en tiu urbo, soldato serĉis korespondemulojn per anonco en *Esperanto* (1927 23/3: 66).

En *Esperanto* (1921 17/6: 117) menciiĝas ke kelkaj rusaj soldatoj el la "Fremda Legi[on]o" lernas Esperanton. C.V. Richard gvidis kursojn en 1923 kaj 1925 kun internacia aŭdantaro, kaj ankaŭ la fotografo R. Manfred laboris en 1925 por Esperanto (EdE p.361-2, 465). Laŭ la statistiko de Dietterle en Tanĝero estis klubo kun dek ses membroj [en 1926]. En 1926-28 troviĝis esperantistoj en dek lokoj: Amizmiz, Arzila, Berrechid, Centa / Cuta (= verŝajne Ceŭto), Kénitra, Marakeŝo, Melilo, Rabato kaj Tanĝero. En 1933 tio ĉi jam estis malpliiĝinta al Ceŭto, Kasablanko, Kénitra, Meknès, Tanĝero kaj Tetuan (EdE p.362). En tiu ĉi lasta ekzistis jam en 1938 E-Societo "Bela Stelo" (Steiner 1938: 106). La unuaj E-grupoj en Kasablanko kaj Port Lyautey (= Kénitra), menciiĝas en la Jarlibro de IEL 1939.

La 12an de aŭgusto 1944 kunvenis en Kasablanko preskaŭ 90 esperantistoj kaj simpatiantoj por fondi la Marokan Esperanto-Asocion (MEA). En 1945 estis 23 IEL-delegitoj en 10 urboj (JL de IEL 1945, unua parto). En la sama jaro fondiĝis la monata organo de MEA, *Afrika Revuo*, tiutempe la sola Esperanta gazeto aperanta en Afriko (JL de UEA 1948, unua parto; *Afrika Revuo* 3/1: titolpaĝo). En la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* de 1947 menciiĝas krom 24 esperantistoj en Maroko ankaŭ Universala Filatelia [tiel] E-klubo en Kasablanko (Steiner 1947: 108).


AFRIKA
REVUO

ENHAVO

Antaŭparolo	J. Fink
Dua Periodo	A.S.T.
Inter veteranoj	
Per Komencantoj	
Ce la sojlo de la 60a jaro	
Mia Pontjo	Casemiro de Abreu
Letero el Francujo	Bayard
Parola E. en Esperanto-Klubo	
Ni diru nin !	
La Maroka Vivino	
Sipestro Hilko de Hemmero	H.J. Bachofner

LA SOLA E. GAZETO,
APERANTA EN AFRIKO
3-a jaro (nova serio) 1-a N°
JANUARO 1947.

Afrika Revuo, januaro 1947

Je la 26a de decembro 1950 Radio Maroc elsendis, dum kvarona horo, unuan, franclingvan, propagandan paroladon pri

Esperanto (RE 1951 44/2: 36). Proksimume unu jaron poste oni jam elsendis franclingvajn Esperanto-kursojn tra tiu ĉi radistacio (RE 1952 45/3: 69). Martofine de 1952 en Rabato okazis ĝenerala kunveno de MEA, en kiu ĉeestis 69 personoj (RE 1952 45/5: 134).

En la Jarlibro de IEL 1955 (dua parto), MEA raportas ke post propagando pere de artikoloj en gazetoj, la movado sukcese progresis en 1954. En la ĉefaj urboj malfermiĝis kursoj diversgradaj en novembro, kun pli ol cent partoprenantoj. Interurbaj renkontiĝoj plifirmigis la bazon de la maroka movado. En 1955 MEA havis en 15 urboj aŭ urbetoj 103 aktivajn membrojn kaj 128 asociajn membrojn. Kursoj okazis regule en kvar urboj. En majo 1955 sukcese okazis la jara kongreso en Rabato. Kreiĝis sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Sed la raporto (JL de IEL 1956, dua parto) ankaŭ rimarkigas ke la politikaj cirkonstancoj ne estas favoraj al la movado. El la raporto pri 1956 evidentiĝas ke la plejmulto el la plej kompetentaj agemuloj forlasis la landon, kio kompreneble malhelpis la movadon. Aliflanke la nacia kongreso de 1956 estis la plej sukcesa ĝis tiam, kun 120 partoprenantoj. MEA havis 212 membrojn kaj 9 grupojn. Organiziĝis junularfako en Meknès kun 25 membroj (JL de IEL 1957, dua parto).

1.1.6. Tunizio

Ankaŭ tie ĉi EdE (p.543) kaj KEL (p.436) ne akordas. Laŭ la lasta la unuaj pioniroj ekde 1892 estis Léon Chemla, advokato, kaj ekde 1900-01 J.M.C. Ganouna en Tunizo. En Aïn-el-Asker Esperanto-pioniroj estis ekde 1900-01 Machuel, Combet, Darmandaritz kaj Colson. EdE (p.543) sciigas ke en 1893 estas abonantoj al *La Esperantisto* en Tunizio, sed ne povas doni nomojn. Laŭ tiu ĉi fonto Victor Machuel, Combet kaj Darmandaritz en 1900-01 loĝis en Tunizo, dum Colson pioniris en Aïn-el-Asker. Laŭ la Jarlibro de SPPE de 1901-1902 Victor Machuel estis adepto en Aïn-el Asker kaj Darmandaritz aprobanto en Tunizo. En 1903 menciiĝas en la Jarlibro de SPPE P.-N. Colson kaj Victor Machuel en Aïn-el-Asker, Henri Richard en Bizerte, pastro de Smet en Mahdia, Henri Livet en Sousse kaj Darmandaritz en Tunizo. La unua loka grupo en Tunizio fondiĝis en Tunizo la 1an de decembro 1903 (JL de UEA 1937).

Dank' al Capé-Montrosier en Alĝerio (v. §1.1.1.), la movado en Tunizio ekde 1904 fariĝis pli vigla ol iam ajn antaŭe. Sub lia influo estis fondita, en la Instituto de Kartago, Esperanto-sekcio, kies Prezidanto estis Poulain. Tiu lasta uzis tiam ankoraŭ novan propagandan manieron nome gluadon de propagandaj afiŝoj de la nord-afrika Esperanto-grupo sur kolonoj de la tramvojoj. En 1907 du Esperanto-asocioj estis fonditaj, unu en Mehdia kaj unu en Sousse (EdE p.543). De 1908 ĝis 1921, en Tunizo kaj Bizerte, regule aperis Delegitoj kaj Subdelegitoj en la Jarlibroj de UEA.

Laŭ la statistiko de Dietterle oni povis trovi en Tunizio esperantistojn en kvar urboj. Temas pri Hammam-Lif, La Pêcherie, Tunizo kaj Tindja. En ĉiu urbo troviĝis nur po unu esperantisto. En 1938 troviĝas J. Mattelaer en La Marsa kaj Leger en Le Kef (Steiner 1938: 107). H. Purson aperas sub Salambo en 1947 (Steiner 1947: 109).

1.2. Okcidenta Afriko

1.2.1. Ganao (iama nomo Ora Bordo)

Unuafoje aperas Delegito en Coomassie (nun Kumasi) en la Oficiala Adresaro de UEA de 1919: Georges Gunst. En la Dietterle-statistiko menciiĝas unu esperantisto en Kumasi.

La samaj pioniroj kiuj antaŭe aperis en Togolando (v. §1.2.3.), aperas en 1938 en Hohoe, en la tiama Brita Togolando[30]. Delegito estis Seth Bediako Anomah kaj Deodat Ignatio Quist estis Vicdelegito. Samtempe aperas unuan fojon la Esperanto-grupo "Togoa Esperantista Grupo", kun adreso ĉe la Delegito kaj kunvenoj dufoje semajne (JL de UEA de 1938).

1.2.2. Malio (antaŭe [parto de] Franca Sudano[31])

Kaj KEL kaj EdE mencias la ĉeeston de la esperantisto Ch. de Troismonts en Segu en 1897. Jardekojn poste, A. Depuis propagandis en Timbuktuo kaj Louis Germain Avid, UEA-delegito en 1927, faris la samon en Bamako (EdE p.521; JL de UEA 1927). Laŭ la statistiko de Dietterle, en tiu periodo, troviĝis nur unu esperantisto en Bamako. Ekde 1945 aperas kiel IEL-delegito en Bamako Robert Martin (JL de IEL 1945), kiu du jarojn poste reaperos en Saint Louis, Senegalio (JL de IEL-UEA 1947).

1.2.3. Togolando

Pruvo de la fakto ke en tiuj unuaj jardekoj nigrafrika esperantisto estis raraĵo, estas ke en *Esperanto* (1933 29/1: 17-18) letero (skribita la 23an de oktobro 1932) kaj foto de Seth Bediako Anomah, togolandano, estis publikigitaj. Li estis lerninta Esperanton en Bremen Mission, ŝajne kiel unu el la malmultaj sukcesoj de UEA interesi la misiojn (v. §1.2.1. kaj noton 4). Ankaŭ *La Praktiko* de aprilo 1933 publikigis lian foton (*La Praktiko* 1933 2/4: 6). Li aperas kiel Delegito en Lomeo en la Jarlibroj de UEA 1933 kaj 1934.

En 1934 jam aldoniĝis Vicdelegito: Deodat Ignatio Quist en Palime. Tiu ĉi lasta aperas kun la novedzino sur foto en *Esperanto* (1933 29/12: 199). En la Jubilea Jarlibro de UEA en 1937 S.B. Anomah menciiĝas kiel pioniro por Togolando. Tamen jaron poste, ambaŭ pioniroj troviĝis en Brita Togolando, nun parto de Ganao (v. §1.2.1. kaj noton 30).

Delegito Anomah

Vicdelegito Quist (maldekstre)

1.3. Orienta Afriko

1.3.1. Etiopio (antaŭe ankaŭ Abisenio)

Pri tiu ĉi lando estas tre malmultaj informoj rilate al eventualaj esperantistoj. La unua konata tiea esperantisto estis Karlo Ludvik, en 1925, en Adis-Abebo (EdE p.129). En tiu urbo li aperas kiel Delegito ekde 1927 (JL de UEA 1927) kaj kiel reprezentanto de Komercista Esperanto-Unio en 1928 kaj 1929 (JL de UEA 1928 kaj 1929). En la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* de 1938 menciiĝas Stefano Accomasso kaj Aldo Scarpi en Asmara (Steiner 1938: 105). Laŭ *La Egipta Esperantisto* (N-ro 10, marto-aprilo 1946: 2), la unua etiopianino kiu lernis Esperanton estis Marie Tadesse, studentino en Egiptio [en 1946].

1.3.2. Tanzanio[32]

Unuafoje aperas Delegito en la tiama Tanganjikio en la Jarlibro de UEA 1930 en la Moshi-distrikto ĉe la Kalimanĝaro-monto: John Williamson. En 1933 li menciiĝas kiel Delegito en Dodoma, kaj poste reaperas en Kenjo (v. §1.6.). De 1929 ĝis 1934 Williamson korespondis kun ICK pri preparo de svahila ŝlosilo (laŭ leteroj trovitaj en la Biblioteko Hector Hodler de UEA), sed tio ŝajne restis sen rezulto.

En 1939 unuan fojon aperas IEL-delegito sur la insulo Pemba, apud Zanzibaro: B. Heywood en Chake-Chake (JL de IEL 1939). En Zanzibaro en 1960 la protestanta pastoro Robert Sparks starigis Esperanto-kurson por hindaj, arabaj kaj afrikaj studentoj de la King George VI School. Fondiĝis Zanzibara Esperanta Klubo (RE 1960 53/5: 90).

1.4. Centra Afriko

1.4.1. Gvineo Ekvatora

Alberto Diaz estis la unua Delegito, en 1927 en la urbo Santa Isabel sur la insulo Fernando-Po (nun: Malaba sur Bioko) (JL de UEA 1927). La Dietterle-statistiko mencias unu esperantiston en Bata (v. ankaŭ notojn 12 kaj 13). Alberto Diaz en 1928 estis Delegito en tiu urbo (JL de UEA 1928). A. Miralles aperas en 1938 en la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* sub Santa Isabel (Steiner 1938: 105).

1.4.2. D.R. Kongo[33]

La unuaj informoj pri E-agado datiĝas el 1905. Pioniroj estis Fr. Hela en Shangugu, ĉe Kivu-lago, kaj Lucien Christiaens (EdE p.298). En 1922 unuafoje estis UEA-delegito en la lando: Antoon Marrevee en Banalia (JL de UEA 1922). Laŭ la statistiko kaj listo de Dietterle troviĝis po unu esperantisto en kvin lokoj, nome en Banalia, Bandundu, Matadi, Panga kaj Stanleyville (nun Kisangani). En 1933 troviĝis UEA-delegitoj en Panga kaj Costermansville (nun Bukavu) (EdE p.298). En 1938 A. Marrevee troviĝis en Yangambi kaj Jean Miliares en Bukavu (Steiner 1938: 105).

En 1949 Edward Symoens okazigis postinstruhorajn Esperanto-lecionojn ĉe la Reĝa Ateneo de Elizabethstad (hodiaŭa Lubumbashi), kie li estis Delegito ekde 1948 (JL de UEA 1948). Krome oni okazigis en la sama lernejo, en dimanĉo, kursojn por plenkreskuloj. Laŭ informo en *Esperanto* (1949 42/6: 75) tiuj ĉi verŝajne estas la unuaj Esperantaj kursoj donitaj en Kongo.

1.5. Suda Afriko

1.5.1. Angolo

La unuaj Delegito, Ernesto de Maya, kaj Vicdelegito, José-Maria Fazenda, aperas en Luando en 1913. Menciiĝas E-grupo ekde 1919 en la sama urbo (JL de UEA 1913 kaj 1919). La Dietterle-statistiko mencias por Angolo dek esperantistojn en ses lokoj, nome en Bailundo, Benguela, Catumbela, [Cural] (verŝajne Cubal), Luando kaj Lobito. Aldone, sub Kongo Portugala aperas unu esperantisto en Kabinda (v. ankaŭ noton 15).

1.5.2. Madagaskaro

Kiel pioniroj estas menciitaj tie ĉi kaj franco, P. Bourdier, kaj madagaskarano, M. Ravelojaona. Ekde 1901 ili ambaŭ pionire aktivis en la ĉefurbo Antananarivo. En 1903 aldoniĝis tie ĉi en Diego-Suarez ankaŭ P. Lemoine (EdE p.356). En la sama jaro aperis kiel aprobanto en la Jarlibro de SPPE M. Ravelojaona en Antananarivo kaj Saulnier en Ifanadiana (JL de SPPE 1903). Du jarojn poste la unuaj Esperanto-

grupoj estis starigitaj, en Antananarivo kaj Ankadifotsy. *Le Courrier de Tananarive* aperigis Esperanto-kronikon kaj artikolojn. En 1907 estis starigitaj kaj malagasa Esperanto-grupo kaj grupo en la 13a regimento de la kolonia infanterio. Tiu ĉi lasta havis 30 membrojn (EdE p.356) kaj, laŭ la Jarlibro de UEA 1937, ĝi fondiĝis jam en 1906.

En la Jarlibro de UEA 1911 aperas la unua UEA-delegito, en Tuléar: Camille Desquivre, sed post tio nur en la Jarlibro de UEA 1926 la lando denove aperas. Delegito estis Jean Laurent Andrianasolo, kaj Daniel Rasolo, Vicdelegito, en Ambohimanoro, Antananarivo.

Laŭ la ICK-raporto de 1929 "troviĝas jam notinda nombro de e-istoj indiĝenaj" (citita en EdE p.356). En 1933 estis preparita malagasa Esperanto-ŝlosilo, de Gervais Botolelahy, Delegito de SPPE en Manakara (EdE p.356; *Franca Esperantisto* 1/1: 14). Ni ne sukcesis malkovri ĉu ĝi presiĝis aŭ ne, sed trovis 47-paĝan manuskripton, titolitan *Fanalahidin' ny Esperanto* en la Biblioteko Hector Hodler en Roterdamo.

En februaro 1959 fondiĝis Esperantista Asocio de Madagaskaro (*Komuna Esperanto-Gazeto* 1984 16/5: 58).

1.5.3. Mozambiko (antaŭe Orient-Afriko Portugala)

Fred. Schmutz aperas kiel unua UEA-delegito por Orient-Afriko Portugala, en 1913, en Inhambane (JL de UEA 1913). En la statistiko de Dietterle, esperantistoj estas menciitaj en du urboj, nome en Lourenço Marques (nun Maputo) kaj Moebase, kaj en la unua troviĝis klubo kun kvin membroj [en 1926]. En 1928 aperas Delegito en Pebane: Manuel da Costa Monteiro (JL de UEA 1928). En la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* de 1938 menciiĝas kvar esperantistoj, en resp. Inhambane, Lobito, Lourenço Marques kaj Pebane (Steiner 1938: 106).

Post tio mankas informoj pri longa periodo, sed ekde 1961 Mozambiko menciiĝas regule en *Esperanto*. Tiel estas prezentita en *Esperanto* (1961 54/1: 17) raporteto de ekspozicio organizita de la Esperanto-sekcio de Clube dos Lisboates. Tiu ĉi okazis, inter la 10a kaj 25a de oktobro 1960, pro la 25a datreveno de la klubo. Oni ne klarigas ĉu ankaŭ ĝia Esperanto-sekcio tiam atingis tiun aĝon. La 7an de majo 1961 estis organizita de Horácio de Jesus Henriques, UEA-delegito en Nampula ekde 1958,

ekspozicio en la salono de la Katolika Junulara Laboristaro. Krom la episkopo kaj la distriktestro, ĉeestis ankaŭ civilaj kaj militistaj aŭtoritatuloj (RE 1961 54/10: 178; JL de UEA 1958, unua parto).

1.5.4. (Suda kaj Norda) Rodezio (nun Zimbabvo kaj Zambio)[34]

La unua Delegito en la tiama Suda Rodezio estis Mary Edith Berry en Salisbury (nun Harare) en 1926 (JL de UEA 1926 kaj 1937). La statistiko de Dietterle montras ke en Suda Rodezio dise en tri lokoj estis kvar esperantistoj, nome en Bulawayo, Plumtree kaj Salisbury. M. E. Berry restis la sola Delegito por la lando ĝis 1931, post kio la lando ne plu aperis en la Jarlibro ĝis 1947. Tiam aperas Jan Semmelink kiel Delegito en Morgenster, Gt. Zimbabwe (JL de UEA 1947, dua parto). En 1949 Semmelink redaktis kaj eldonis la informilon *Afrika Voĉo*: ĝi grandparte temis pri lia Mashonaland-Misio, kie li estis la presejestro, kaj parte pri la Esperanto-movado (*Afrika Voĉo* n-ro 9, septembro 1949).

En la tiama Norda Rodezio la unua Delegito, H.G. Russell en Nkana, aperas nur en 1937, ĝis 1940 (JL de IEL 1937-40). Ankaŭ ĉi tie nur en 1947 reaperas Delegito: John L. Wright en Mutanda (JL de UEA 1947, dua parto).

Fine de 1950 Leif Heilberg fondis kaj komencis redakti la revuon *Afrika Esperantisto*, kion li faris, ĝis Edwin de Kock (en Sud-Afriko, v. ankaŭ § 1.5.5.) transprenis ĝian redakton en 1956 (De Kock 2004). En *Esperanto* (1956 49/1: 3) oni informas pri la fondo de Tut-Rodezia Esperanto-Societo. Marte de 1956 estis 16 membroj en la Societo (*Afrika Esperantisto* 1/2: 2).


Edwin de Kock

1.5.5. Sud-Afriko[35]

Pioniroj en Pretorio estis H. Best en 1894 kaj H.P. Alberts en 1896. En Kablando pioniris E. Way kaj H. Clark. En Johannesburg troviĝis en 1901 W. Coquelin (kiu

aperas sub tiu urbo kiel unua adepto por Sud-Afriko, en la JL de SPPE en 1903), kaj en 1905 A.F. Whiteside (EdE p.520; KEL p.437). W. Carter estis pioniro en Pretorio ekde 1905, kaj tie fondis en 1906 la unuan Esperanto-grupon. La centro de la movado restis Pretorio, kie en 1908 estis fondita Esperanto-societo. En tiu sama jaro ankaŭ en Durban kaj respektive Wellington estis fonditaj Esperanto-grupoj (KEL p.437; JL de UEA 1928). Ekde 1911 J. Dusart eldonis en Durban la revueton *The South African Esperantist* (KEL p.437), sed ni ne sukcesis certiĝi pri pli ol unu, preskaŭ malplena, provnumero. En 1914, el la 44 membroj de UEA en la lando, 33 estis koncentritaj en Kaburbo, tiam la sola urbo en Afriko kun pli ol 20 membroj (RE 1914 10/13: 211) (v. ankaŭ la enkondukon).

En 1926 en Pretorio geedzoj James kaj R. Spero organizis dek du Esperanto-kursojn (EdE p.520). Laŭ la statistiko de Dietterle [en 1926] estis klubo kun 32 membroj en Pretorio. Sekvajare por la unua fojo menciiĝas la Pretoria E-grupo "Suda Kruco" en la Jarlibro de UEA (1927). La statistiko de Dietterle montras ke en tiu periodo en Kablando estis esperantistoj en kvar lokoj: Beaufort West, Kaburbo, Sea Point kaj Wynberg (la lastaj du nun estas antaŭurboj de Kaburbo) kaj en Transvaal en sep lokoj: Benoni, Elim, Johannesburg, Irene, Pietersburg (nun ankaŭ nomata Polokwane), Pretorio kaj Tzaneen.

(Sudafrika) Prys: 2 pennies.

SLEUTEL VIR ESPERANTO

Esperanto, die internasionale hulptaal, wat deur dr. L. L. Zamenhof van Warskou gevorm is, het in 1887 verskyn. Sy doel is nie om die moedertaal te verdring nie, maar om naas die moedertaal as tweede taal vir elkeen te staan. In die moderne, internasionale verkeer, sowel gewoon as saaklik en geestelik, vir tegniese uitvindings, spesiaal vir die radio, vir internasionale kongresse, ens, is Esperanto die aangewese taal en word dit dan ook as sodanig reeds baie gebruik.

Esperanto se basis is die moderne kultuurtale. 'n Verklaring van 27 voortreflike lede van die Franse Wetenskaplike Akademie sê die volgende omtrent Esperanto: «'n Standaardwerk van logika en eenvoudigheid».

Dis 'n neutrale taal, wat geen nasionale gevoelens beledig. Dit vorm daarom 'n ideale brug tussen die verskillende volke.

Hierdie boekie bevat die ganse grammatika van Esperanto met ruim 1800 woorde Esperanto - Afrikaans, wat in die daelikse verkeer gebruik word, asook omtrent 225 handelswoorde en 'n tabel van die korrelatiewe. Die grammatika kan in 'n uur geleer word. Uitsonderings en onreelmatighede kom nie voor nie.

Die woordelys bestaan uit 'n klein aantal internasionale stamme, wat elke ontwikkelde mens ken. Deur middel van voor- en agtervoegsels kan 'n mens maklik 'n onbepaalde aantal nuwe woorde maak. Met behulp van

Sudafrika ŝlosilo

En 1933 troviĝis UEA-delegitoj en Beaufort West, Kaburbo, East London kaj Johannesburg (EdE p.520). La unua afrikansa ŝlosilo, *Sleutel vir Esperanto*, eldoniĝis en 1934, en 10 000 ekzempleroj. En 1938 por la unua fojo en la lando disaŭdiĝis per la radio paroladoj pri Esperanto (JL de IEL 1939). Malgraŭ la milito, la movado en Sud-Afriko iom progresis en 1943. Krom instruado,

okazis ankaŭ la fondo de Laborista Esperanto-Kunularo en Johannesburg (JL IEL 1944, unua parto), kaj en Kaburbo Siegfried Liebeck fondis la grupon "Bona Espero" (JL de IEL 1946, unua parto; De Kock 2004).

La plej aktiva esperantisto en tiuj mezaj 1940aj jaroj estis David Dambe, SAT-ano ekde 1924. Li estis la redakcia sekretario de la sendependa revuo *Libera Tribuno*, kiu aperis unuan fojon en julio 1946, kiel posteulo de *Per Unu Voĉo*, kiu estis la organo de la Laborista Esperanto-Kunularo. Dambe ankaŭ verkis rakontojn ĉerpitajn el "la nigrega vivo kaj sorto de la nigra raso", "ne vualante la maljustojn de la 'blanka kulturo'" [emfazo en la originalo]. Tiuj rakontoj fontis el la realo de la malnova Sud-Afriko (De Kock 2004; EdE p.100; *Libera Tribuno* 1946 1/1: 1; *Per Unu Voĉo* 1946 3/6: [260]).

Nico J. van der Merwe, juna fervora e-isto, en 1949 fondis la Stellenbosch Esperantan Asocion kaj verkis la unuan Afrikansan lernolibron, *'n Afrikaanse kursus in Esperanto,* kiu eldoniĝis en 1954 (De Kock 2004). En 1950 F.M. Woolf, UEA-fakdelegito pri komerco en Port Elizabeth, sukcesis tiom interesi por Esperanto la edukadan instancon de la teknika lernejo de sia urbo, ke ĝi permesis la E-instruadon, malgraŭ la fakto ke la tiea movado tiumomente estis konsiderata de UEA kiel malforta (JL de UEA 1950, unua parto; *Esperanto* 1950 43/6: 84). En 1952 fondiĝis "Johanesburga E-Societo" kaj, almenaŭ en 1956 estis kluboj ankaŭ en Port Elizabeth kaj Bloemfontein (*Afrika Esperantisto* 1/2: 1, 4; De Kock 2004).

Samjare Edwin de Kock, lerninte Esperanton nur la antaŭan jaron, transprenis la redakton de la revuo *Afrika Esperantisto,* ĝis tiam eldonita en Rodezio (v. §1.5.4.). En 1957 Edwin de Kock gajnis la duan prozpremion de la Belarta Konkurso de UEA por la rakonto *Vekiĝo*. Per du partoj el la librolonga *Kvin elementoj*, li kontribuis al *Esperanta Antologio: Poemoj 1887-1957* (RE 1956 50/9:128; Auld 1958: 640). En Johannesburg oni organizis grandan Esperanto-ekspozicion en 1960 (RE 1960 53/6: 104).

1.6. Mallonge pri pluraj ceteraj landoj

Pri pluraj afrikaj landoj ne haveblas multaj informoj. Pro tio ni ilin listigas ĉi tie nur mallonge kaj laŭregione, kun mencio de la pioniro,

kaj/aŭ de la unua Delegito, kaj se haveblis informoj, de la unua grupo en la lando.

Okcidenta Afriko:

- Ebura Bordo: Laŭ la Dietterle-statistiko estas unu esperantisto en M'Bahiakro, sed la Jubilea Jarlibro de UEA 1937 mencias kiel pioniron Guy Rifaud ekde 1931. Li aperas kiel unua Delegito en 1932 en la urbo Abidjan kaj menciiĝas kiel membro de SAT en la sama jaro (JL de UEA kaj resp. de SAT 1932).
- Gvineo-Konakrio: Louis Demarest, antaŭe kunfondinto de la Societo por la Propagando de Esperanto, faris post 1902 pioniran laboron en Konakrio, en (la tiama) Franca Gvineo (KEL p.150; EdE p.107). La unua societo estis fondita en Konakrio en 1904 (JL de UEA 1937). La unua UEA-delegito aperas en 1912: Maurice Girardot en Konakrio (JL de UEA 1912).
- Kabo-Verda: Menciiĝas unu esperantisto en São Vicente en la Dietterle-statistiko.
- Liberio: La Dietterle-statistiko mencias unu esperantiston en Monrovio.
- Madejro: La unua societo en Madejro fondiĝis en 1908 en Funchal (JL de UEA 1937). Unua Delegito estas Ernesto-C. Pereira en Funchal en 1916 (JL de UEA 1916). En 1919 aldoniĝas Vicdelegito, Antonio Silva Leça, kaj la E-grupo "La Verda Stelo". Ekde 1927 aldone menciiĝas la kristana E-grupo "Damião de Goes" (JL de UEA 1919 kaj 1927).
- Niĝerio: La unua Delegito estis Joshna-Benjamin Bagandoji en 1912 en Lagoso (JL de UEA 1912). La Dietterle-statistiko mencias unu esperantiston en Port Harcourt. En 1938 Nathaniel Kola Ajayi listiĝas sub Lagoso en la *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj* (Steiner 1938: 106).
- Niĝerlando: Charles Lichtenberger en Tera estis la unua Delegito en 1936 (JL de UEA 1936).
- Senegalio: Pioniro estis suboficiro Louis Pontoiseau en Dakaro en 1904 (JL de UEA 1937). En junio 1905 li kandidatiĝis kiel adepto de SPPE (*L'Espérantiste* 8/6: 124-125). Ekde 1947 aperas Robert Martin (v. §1.2.2.).

- Sieraleono: J.R. Pfanner estis la unua Delegito en 1946 en Gandorhun ĉe Segbwema (JL de IEL 1946, unua parto).

Orienta Afriko:

- Somalio: La Dietterle-statistiko mencias unu esperantiston en Mahadday Weyne. Plej verŝajne temas pri Ibrahim Ismail, somala esperantisto kiu en 1928 verkis longan artikolon pri sia lando en *Esperanto* (1928 24/6: 118-120).
- Kenjo: En 1937, John Williamson, antaŭe en Tanganjikio (v. §1.3.2.) listiĝis kiel unua, kaj dum pluraj jaroj kiel sola Delegito (de IEL kaj poste UEA) en diversaj lokoj en Kenjo. Ekde 1947 R.W. Rayner aldoniĝis kiel Delegito en Najrobio por pluraj jaroj (JL de IEL kaj UEA).

Ibrahim Ismail

Centra Afriko:

- Gabono: Unua Delegito en 1954 en Port-Gentil estis André Courtis (JL de UEA 1954, unua parto).
- Kamerunio: En 1956 aperas la unua Delegito: Suzanne Eymin en Foumbot (JL de UEA 1956, unua parto).
- Kongo (Brazavila): Unua Delegito en 1946 en Brazavilo estis Fernand Knecht (JL de IEL 1946, dua parto).
- Sao-Tomeo kaj Principeo: Unua Delegito estis Manoel Martins Xavier de Pina en Sao-Tomeo en 1927 (JL de UEA 1927). *Esperanto* (1928 24/2: 40) raportas pri li ke "nia nigra samideano" komencis kurson por indiĝenoj post prepara korespondado kun ICK. Laŭ la Jubilea Jarlibro de UEA 1937 la unua Societo fondiĝis en 1931.

Suda Afriko:

- Maŭricio: La unua societo fondiĝis en 1909 (JL de UEA 1937); unua Delegito en Portluiso estis A.-F. Lebrasse en 1911 (JL de UEA 1911). Ankaŭ la Dietterle-statistiko mencias unu e-iston en Portluiso.

Konklude

Kvankam estas grandaj diferencoj rilate viglecon de la movado en diversaj landoj, eblas trovi kelkajn komunajn trajtojn. Kiel ĉie, kaj daŭre, tiu vigleco dependas precipe de unu aŭ kelkaj individuoj kiuj tre aktivas aŭ ne. Plej ofte la pioniroj kaj unuaj aktivuloj estis koloniantoj, kiuj nur en maloftaj kazoj (bona ekzemplo estas Egiptio) sukcesis ne nur varbi sed ankaŭ aktivigi aŭtoktonojn. Tio kaŭzis ke la movado plej ofte, se ne malaperis, minimume multe malgrandiĝis kiam tiuj aktivuloj forlasis la landon post siaj laboroj, pro la milito aŭ post la sendependiĝo: bedaŭrindaj ekzemploj estas Maroko kaj Alĝerio. Evidente tio ne estis la kazo en Sud-Afriko, kie la movado ankaŭ konsistis plejparte el blankuloj, kiuj plej ofte jam de pluraj generacioj loĝis tie. Sed en plejparto de la landoj, oni eĉ antaŭ la sendependiĝo ne povis paroli pri movado; estis jen kaj jen Delegito, kelkaj membroj kiuj ne aktivis, kaj jen la tuto.

En tiuj landoj kie ja estis iom da aktivado, estas atentokapta fakto ke oni ja sufiĉe facile ekaperigis revu(et)ojn, sed plej ofte ĉi tiuj havis nur mallongan vivon. Tio ne malhelpis la redaktorojn alvoki la esperantistojn en Afriko utiligi ilian revuon kiel tutregionan aŭ tutkontinentan, se ĝi hazarde estis la sola revuo en la kontinento en tiu momento. Ekzemploj estas *La Egipta Esperantisto* en Egiptio en 1922 (v. §1.1.2.), kaj *Afrika Revuo* en Maroko de 1945 ĝis 1947 (*Afrika Revuo* 1947 3/6-9: dorspaĝo).

2. Evoluo de la movado inter 1960 kaj 1980

Enkonduko

Post la sendependiĝa ondo, la interesiĝo pri Afriko kreskis en la eŭropa Esperanto-movado, kio instigis la jugoslavon Tibor Sekelj al unujara migrado tra Afriko per Karavano de Amikeco por kultura interŝanĝo (v. §2.1.). Aliaj esperantistoj atentis precipe pri la lingvaj problemoj en Afriko. En diversaj Esperanto-gazetoj aperis, krom mallongaj artikoloj aŭ anoncoj pri kurso aŭ ekspozicio, jen kaj jen pli longaj artikoloj pri la lingva situacio en Afriko, la rolo kiun la Esperanto-movado tie povas aŭ volas ludi, kaj la malfacilaĵoj kiujn ĝi povas renkonti tie.

Oni starigis komisionojn (v. §2.4. kaj §2.5.) kaj eldonis broŝurojn (v. §2.2.) por esplori la lingvan situacion en Afriko, kaj por konvinki la afrikanojn pri la utilo de Esperanto rilate la solvon de iliaj lingvaj problemoj. Inter la eŭropaj esperantistoj tamen regis malkonkordo pri la taŭgaj strategioj por rapide kaj efike akceptigi Esperanton en Afriko, kio estis instigo al polemiko en la revuo *Esperanto* (v. §2.3.).

2.1. La Karavano de Amikeco: la malsukcesa komenco?

La Karavano de Amikeco ekvojaĝis la 8an de marto 1962 kun ok partoprenantoj (el kiuj kvar esperantistoj) tra Turkio kaj Sirio al Egiptio. Tie komenciĝis la vera vojaĝo, kiu havis kiel intencon tramigri kiom eble plej multe da landoj de Afriko, sed kiu post unu jaro tra orienta Afriko, finiĝis en Daresalamo (Sekelj 1991).

Kiam esperantistoj parolas aŭ skribas pri la movado en Afriko ili sufiĉe ofte referencas al tiu ĉi projekto de Tibor Sekelj (interalie Gruner 1994: 26 kaj Bakker, intervjuo, 18/1/1999). Ŝajnas kvazaŭ tio estintus la unua propagando por Esperanto en Afriko, kiu tamen estas konsiderata nesukcesinta, ĉar la afrikaj interesitoj ne estis mentorataj kaj poste ili ne plu ricevis multajn informojn, kaj rezignis (Bakker, intervjuo, 18/1/1999). Estas fakto ke lia propagandado por Esperanto en Afriko postlasis ne multajn spurojn, sed verdire tio ankaŭ ne estis lia prioritata intenco. Ŝajnis prefere al li en tiu momento, dum aŭ ĝuste post la sendependiĝo

La Karavano de Amikeco en Luksor, Egiptio. De maldekstre dekstren: T. Sekelj, J. Munitz, H. Grossmann, O. Baniewicz, J. Aleksić, D. Stevanović, B. Marjanović kaj J. Knabe.

de la plejmulto de afrikaj landoj, tre urĝe krei amikajn rilatojn inter afrikanoj kaj neafrikanoj, per disvastigado de konoj pri la naturo kaj pri la homoj de Afriko. Por tio li volis dum tiu ĉi ekspedicio kolekti multajn informojn.

Krome li estis ankaŭ decidinta ke ne plu sufiĉas paroli pri la foresto de Afriko en la movado, kaj li trovis ke la momento alvenis por ekagi. Kaj antaŭ ol ekagi plenforte, iu el la aktivuloj nepre devas konatiĝi kun la faktoj pri tiuj landoj, iliaj popoloj, lingvoj kaj problemoj, kaj tion li vidis kiel sian taskon (Sekelj 1962a: 190).

Li tamen parolis pri Esperanto jen kaj jen en universitatoj, kun ministroj pri edukado, kaj en Tanzanio eĉ kun Prezidento Julius Nyerere. Krome li survoje donis kelkajn lecionojn. Liaopinie oni povas mezuri la laboron de la karavano por Esperanto ne laŭ la nombro de novaj esperantistoj aŭ societoj, sed ja laŭ "la valora kontribuo al la ekkono de Esperanto sur tiu kontinento", en la formo de "multaj centoj da distribuitaj broŝuroj pri la Internacia Lingvo, la multaj miloj da gazetoj sur kies paĝoj oni parolis pri Esperanto, kaj la multaj altranguloj kaj aliaj homoj al kiuj ni persone

parolis pri ĝi, kiuj povis praktike vidi la funkciadon de nia lingvo inter la karavananoj" (Sekelj 1963: 206-7).

En la lasta ĉapitreto de lia libro, pri la dolĉaj rememoraĵoj kaj pri tio kio nun estos farenda, ne troviĝas eĉ unu vorto pri Esperanto (Sekelj 1991: 162-4). Sufiĉis do por li konatigi Esperanton en Afriko, sed li ne havis la intencon, nek en la komenco, nek je la fino de sia vojaĝo, eksekvadi la interesitojn. Tiukaze oni ĝustadire ne povas riproĉi al li ke li ne faris tion ĉi. Sed ja estis UEA, sciante oficiale pri la ekspedicio (RE 1963 59/1: 16), kiu povintus utiligi la kontaktojn faritajn, por ankaŭ en la praktiko fariĝi efektive 'universala' asocio. Jarojn poste ankoraŭ kelkaj el liaj adresoj estis uzataj de TEJO (v. §2.4.), sed tiam estis fakte multe tro malfrue por ankoraŭ povi profiti el la entuziasmo kiun Sekelj laŭfame estis vekinta.



Kovrilo de la libro *Ĝambo Rafiki*, pri la karavano de amikeco tra Afriko

2.2. UEA-ideologio en la komenco de la 1960aj jaroj

La broŝuro *Esperanto: Komuna Lingvo por Afriko – Komuna Lingvo por la Mondo* donas ideon pri la ideologio kiun UEA uzis, ĝuste post la sendependiĝa ondo, por akceptigi kaj vastigi Esperanton en Afriko. Ĝi aperis en 1962, en la angla[36], la franca[37] kaj la araba[38] (RE 1964 60/10: 102). La origina Esperanto-versio de la teksto estas verkita de Tibor Sekelj[39]. Li komencas per mallonga priskribo de la ĝenerala lingva situacio – kiu finiĝas per la konstato ke homoj de diversaj afrikaj landoj ne povas kompreni unu la alian se ili estis koloniitaj de malsamaj eŭropaj potencoj – el kio liaopinie sekvas ke tiu ĉi situacio fariĝis neakceptebla kaj ke la afrikaj popoloj urĝe bezonas komunan lingvon. Tiu ĉi lingvo devos esti lernata tra la tuta kontinento kiel dua lingvo,

tiel ke “[l]a kultura interŝanĝo de tribo al tribo, de nacio al nacio, ekiros paralele kun la teknika progreso, por la kreo de unueca kaj forta Afriko kun pli brila estonto” (Sekelj 1962b: 3). Tio krome “signifus grandan paŝon antaŭen al la interamikiĝo kaj la paciĝo de la mondo”, se tiu ĉi lingvo aldone iam povus esti akceptita ankaŭ de la cetero de la mondo, laŭ la ekzemplo de Afriko (Sekelj 1962b: 3).

Post tio sekvas argumentado pri la elekto de tiu dua lingvo. La francan kaj la anglan li deklaras neakcepteblaj, ĉar por povi akiri kompletan, do ankaŭ kulturan sendependecon, Afriko devas liberigi sin de la lingvoj de la estintaj koloniaj potencoj. Tial iuj proponis jam unu el la tri plej parolataj afrikaj lingvoj, sed tio ĉi estus avantaĝa por tiuj kies gepatra lingvo estos elektita kaj do estigos sentojn de supereco kaj ĵaluzon (Sekelj 1962b: 5). El tio ĉi sekvas la kondiĉoj por akceptebla dua lingvo: ĝi devas esti neŭtrala kaj ne malkontaktigi Afrikon de la cetera mondo. Post tio Esperanto estas prezentata. La respondo je la fakto ke ĝi estas farita de eŭropano, estas ke ankaŭ la telefono, la radio kaj la aŭto estas eŭropaj aŭ usonaj inventaĵoj, sed ke neniu afrikano pro tio rifuzos ilin. La modernaj uzobjektoj apartenas al ĉiu kiu ilin utiligas, kaj tia uzobjekto estas Esperanto por tiuj kiuj alprenas ĝin (Sekelj 1962b: 6). Sekvas argumentoj rilate al ĝia neŭtraleco (koncerne kaj ideon kaj konstruitecon de la lingvo mem), la facilo kun kiu oni povas lerni ĝin, la fakto ke oni povas utiligi ĝin en ĉiu sfero, kaj priskribo de tio kion Esperanto jam atingis dum sia mallonga ekzistado, malgraŭ la tendenco de la homo rifuzi ĉion kio estas nova.


Al Esperantje

اللغة الدولية

الاسبرانتية

لغة العالم أجمع

بقلم

تيبور سكيليج

ليسانسيي في الحقوق ف. ر. ج. س.

نشرته :

الجمعية الدولية الاسبرانتية

قسم الاخبار

روطردام 1962

مطبعة دار الكتاب – الدار البيضاء

Arablingva varbilo por afrikanoj, 1962.

La teksto finiĝas per ebla estonteca skizo pri ĝia disvastigo kaj la avantaĝoj kiujn la afrikanoj povos tiri el ĝi. Afriko povos ekzemple pli bone dediĉi siajn energion kaj disponeblajn financojn al la evoluigo de siaj landoj kaj popoloj, pro tio ke ĝi ne estos forlogata de la batalo pri la lingvaj problemoj. Oni ankoraŭfoje emfazas ke sendube aliaj nacioj kaj kontinentoj sekvos la afrikan ekzemplon. Ŝajnas certe al la aŭtoro ke "la iniciato de tiu nova erao estos la granda kontribuo de Afriko al la solvo de grava kultura problemo de la hodiaŭa mondo" (Sekelj 1962b: 10). Ĝi donas eblon al la afrikanoj "ion kontribui ankaŭ al la ĝenerala progreso de la homaro" (Sekelj 1962b: 10). Post la teksto sekvas citaĵoj de sep gravuloj, inter kiuj du afrikaj ministroj, kiuj pozitive parolis pri Esperanto, kaj listo de adresoj de la naciaj Esperanto-asocioj. Inter tiuj ĉi nur unu estis afrika: Esperantista Asocio de Madagaskaro (Sekelj 1962c: 11).

El tiu ĉi broŝuro montriĝas ke oni proponis Esperanton al la afrikanoj kiel lingvon kiu povas helpi al ili, pro sia neŭtraleco, por ke ili fariĝu kulture sendependaj. La fakto ke Esperanto tiam (kaj ankaŭ nun) ankoraŭ ne estis sufiĉe disvastigita por vere servi kiel internacia lingvo, evidente ne estis konsiderata kiel problemo. Oni eĉ petis Afrikon doni la ekzemplon. Poste venos kritiko je tio: kelkaj asertis kontraŭe ke por afrikanoj lerni Esperanton ne havas sencon se ĝi ankoraŭ ne estas rekonita de Eŭropo aŭ UN (inter aliaj Rousseau, v. §2.3.). Ankoraŭ poste afrikaj esperantistoj mem deklaros en kongresa rezolucio ke, " . . . [n]eniu afrika lando povas, sen la permeso de la koloniintoj, adopti Esperanton kiel oficialan lingvon" (el la rezolucio de la tria Togolanda Esperanto-Kongreso, 28-31an decembro 1995 en *Ondo da Vero* 3/1: 7).

2.3. Polemiko

Ekde 1963 oni faris specon de polemiko en la oficiala organo de UEA per diversaj pli longaj artikoloj pri la aplikenda strategio. Homoj kiuj estis pasigintaj difinitan periodon en Afriko (plej ofte pro sia profesio), lingvistoj kaj aliaj esprimis tiel sian opinion. Estas interese rigardi de iom pli proksime tiujn ĉi diversajn opiniojn, kvankam ili ne reprezentis oficialan UEA-starpunkton.

En *Esperanto* (1963 59/7-8: 122-3) estis publikigitaj leteroj de tri esperantistoj pri iliaj travivaĵoj en Afriko. Du el ili menciis Esperanton. La unua, Mark Starr, estis provinta vere fari ion por Esperanto kaj proponas strategion, ĉar liaopinie Afriko vere bezonas Esperanton. Lia plano konsistas el disdonado de la broŝuro de T. Sekelj (v. §2.2.), eldonado (por orienta Afriko) de gramatiko en la svahila, propono al ĉiu Ministro pri Edukado "en ĉiu nova lando" ke li akceptu UEA-delegacion por diskuti la lingvan problemon, kaj listigo de kompetentaj instruistoj kiuj estos pretaj organizi kursojn por instruistoj (Starr 1963: 122-3). Li koncedas tamen ke ekzistas multaj obstakloj, kiel la timo de la multlingvuloj kaj lingvoinstruistoj perdi sian postenon.

La alia skribinto, Wim de Smet, lernis Esperanton nur post sia restado en Afriko, sed tamen certigis el propra scio ke afrikanoj lernos nur tiujn lingvojn kiujn ili vere bezonas. Estis do tempo por fari kontaktojn per Esperanto sur diversaj terenoj kiel komercado, scienco, edukado, turismo, politiko ktp. Se Esperanto montros sin tiele sur diversaj terenoj, liaopinie ĝi ankaŭ vekos intereson en Afriko (De Smet 1963: 123).

Preskaŭ jaron poste aperis kvarpaĝa artikolo sub la titolo *Lingvoj en Afriko: Laikula Vidpunkto* (Tonkin 1964a: 102-5). En ĝi, Humphrey Tonkin unue mencias aferojn kiuj jam okazis en la kadro de la enkondukado de Esperanto en Afriko kaj poste faras al la legantaro la demandon, ĉu ĝi scias aŭ ne kion ĝi volas atingi tie, kaj ĉu ĝi sufiĉe konas aŭ ne la sociologiajn faktorojn antaŭ ol ekfari planojn. Li mem nee respondas sian demandon, priskribas la komplikecon de la lingva situacio en Afriko kaj la neĝustajn ideojn kiujn liaopinie havas pri ĝi la esperantistoj. Lia tezo estas ke scienca esplorado okazu por pruvi la ade cititajn avantaĝojn de Esperanto kaj inventari la eblojn esperantlingvigi lernolibrojn pri ĉiuj studotemoj. Nur tiam la faktoj povos esti prezentataj al la ministerioj pri edukado. Plue estas necese ke tio ĉi okazu rapide, ĉar kiam la diversaj edukadaj sistemoj en Afriko fariĝos stabilaj, ili malpli emos fari ŝanĝojn.

Al tio venas reago de Henri Rousseau, UEA-delegito en Pointe Noire, Kongo[-Brazavilo] (Rousseau 1964: 164-5), en artikolo titolita: *Lingvoj en Afriko: afrika vidpunkto*. La aŭtoro, kvankam eŭropano, nomas sin

afrikano pro sia multjara restado en Afriko. Post enkonduko en kiu li senkreditigas la tonon de la antaŭa artikolo, li listigas la malfacilaĵojn kiuj povas malhelpi la disvastigadon de Esperanto. Krom al evidentaj faktoroj kiel la "malriĉego" kaj la "malalta klerecnivelo" (kvankam li ne rigardas tiun ĉi lastan kiel netransireblan, ĉar liaopinie oni devos ja ne okupiĝi trans la varbado de tiuj kiuj scipovas eŭropajn lingvojn), li ankaŭ montras la fakton ke la ekonomia evoluado absolute prioritatas ĉe la ŝtatestroj kaj ke la novaj elitoj interesiĝas nur pri tio kio alportas senperan profiton. El tio ĉi li konkludas ke la esperantistoj devas elkapigi la utopian ideon ke la afrikanoj ludos pioniran rolon en la oficialigo de Esperanto. Sed eblas, liaopinie, ja engaĝi Afrikon en la mondan esperantistaron je nivelo komparebla al tiu de Eŭropo aŭ Ameriko. La plej taŭgaj homoj por realigi tiun ĉi celon estos tiam la afrikaj studentoj en eŭropaj universitatoj[40] kaj la esperantistoj kiuj jam estas surloke aŭ kiuj libervole tien iras por du aŭ tri jaroj. Financaj rimedoj laŭ li povas veni nur el eksterlando. La agmetodoj devas esti la samaj kiel aliloke: informado, publikaj kursoj, fondo de asocioj ktp.

Responde al tiu ĉi artikolo, Humphrey Tonkin atentigas (Tonkin 1964b: 165) pri tio ke tiuj ĉi metodoj nur aldonas lingvon al la jam ekzistantaj. Kontraŭe estas necese, post ĝisfunda studado de la celo kaj la metodoj, enirigi Esperanton en la edukadajn sistemojn de la koncernaj landoj. Liaopinie la afrikaj registaroj reagos favore al propono subtenata per faktoj.

Ankaŭ Ernesto Sonnenfeld reagis al la artikolo de Tonkin (Sonnenfeld 1964: 206-7). Li trovas tiun ĉi lastan sufiĉe negativa, kaj donas, laŭ propra diro, pli pozitivajn sugestojn. Liaopinie propagandado ne plu estas "nia tasko". Informado sufiĉas, dirante: "Jen Esperanto, via kunpropraĵo; ne uzante ĝin, vi krimas kontraŭ via popolo." (Sonnenfeld 1964: 206) Sonnenfeld agnoskas ke Esperanto ankoraŭ ne disponas pri la dezirata teknika literaturo. Sed se afrikaj aŭ aliaj ŝtatestroj kaj intelektuloj komprenus la avantaĝojn kaj la eblojn de Esperanto, ili ankaŭ komprenus ke necesas kunlabori pri la kreado de teknika kaj porstuda literaturo. Li ankaŭ proponas al UEA ŝanĝon de metodo, nome ne plu investi tiomajn tempon kaj monon en la serĉadon de kelkaj centoj aŭ miloj da homoj

kiuj estos pretaj lerni Esperanton, sed en la fondo de speciala fako 'Publikaj Rilatoj'. Ĝia celo estu komprenigi ĉiujn ŝtatojn, sed ja precipe la novajn kaj malgrandajn ŝtatojn, ke la esperantistoj estas pretaj eduki instruistojn kaj prepari la necesan fakan literaturon, sed ke la iniciato devas esti ilia, ĉar ankaŭ la profito estos ilia.

Plie, en tiu sama jaro aperis ankaŭ artikolo de tute alia ĝenro, kiu tuŝas tiun ĉi temon. Nome en *Esperanto* troviĝas la malferma parolado de prof. C.C. Berg, rektoro de la Internacia Somera Universitato dum la universitata jaro 1964-65. En ĝi li tuŝis la demandojn, kiuj estas la lingvaj bezonoj de la novaj ŝtatoj de Azio kaj Afriko kaj kiun rolon la internacia lingvo povas ludi en tiuj kontinentoj. Post klarigo de la lingvaj problemoj en tiuj ĉi landoj, li certigas ke la esperantistoj devas kompreni ke en multaj kazoj la plej rekta vojo al plibonigo de la vivcirkonstancoj de milionoj da homoj ankoraŭ ne povas esti Esperanto. Esperanto ne solvas ĉiun komunikadan problemon. Sed li ja emfazas ke ĝia enkonduko en la mezlernejojn, kolegiojn kaj universitatojn povas plifaciligi la evoluigon de nacia lingvo kiel instrua lingvo por larĝaj tavoloj de la popolo. Ĉar, li asertas, simpla internacia lingvo estas la plej malmultekosta fenestro kiun oni povas malfermi al la ekstera mondo (Berg 1964: 162-3).

La legado de tiuj ĉi diversaj opinioj klare indikas ke la ideo disvastigi Esperanton en Afriko estis tre vigla, almenaŭ ĉe parto de la eŭropaj esperantistoj, sed ke la ideoj pri la taŭga maniero kaj la eblaj ŝancoj sufiĉe diverĝis. Konsidere ke oni tiam ankoraŭ povis iri en ĉiuj direktoj, tio ĉi estas komprenebla. La junularaj organizoj de la Esperanto-movado en tiu ĉi periodo klopodas procedi iom pli praktike per komisionoj.

2.4. La strategio de la junularaj Esperanto-organizoj

Jam komence de la 1960aj jaroj en la eŭropa Esperanto-movado oni starigis komisionojn por Afriko, ekz. la Komisionon por Afriko establitan en 1961 de la Pola Esperanto-Junularo (PEJ) (Pietrucha 1963: 7). En aprilo 1962 oni anstataŭigis tiun ĉi per Centro de Esploroj pri Afriko (*Tamen* 1962 4/9: 25), kiu direktis sin same al esperantistoj kiel al neesperantistoj, kaj kies celo estis: "1. scienca esplorado de la afrikaj problemoj, precipe koncerne la eblecojn de apliko de esperanto en

Afriko; 2. publikigo de la esplorrezultoj; 3. helpo al la interesiĝantoj pri Afriko" (Pietrucha 1963: 7).

Kelkajn jarojn poste, en 1968, ankaŭ TEJO fondis Komisionon por Afriko (Lapenna 1974: 503). La intenco estis ke ties programo validos por ĉiu afrika lando, ĝis nacia sekcio de TEJO estos starigita (Jansen 1970: 84). Tiu ĉi programo distingis tri paŝojn, el kiuj la unua estis informado. Por tio ĉi oni povos utiligi ĉiajn metodojn, kaj estis konsilite ke la komisionanoj daŭre restu en reciproka kontakto. Por helpi en tio la komisiono eldonis bultenon titolitan *Esperanto en Afriko*. La redaktado, same kiel la gvidado de la komisiono, kuŝis ŝajne en la manoj de Eugène Raveloson en Madagaskaro (*Esperanto en Afriko* 1970 1/1: 1), sed efektive ĉio estis en la manoj de eŭropanoj (Corsetti, pers. kom., 17/2/1999). La bulteno, ekzemple, estis multobligita de la junulara grupo en Bjelovar, (tiama) Jugoslavio (Jansen 1970: 84). La eŭropaj membroj de TEJO ankaŭ multe korespondis kun la afrikaj esperantistoj, kiuj taksis korespondadon inter si ne sufiĉe prestiĝdona (Corsetti, pers. kom., 4/3/1999). Raveloson ankaŭ sendis cirkulerojn al la komisionanoj kiuj reprezentis dek unu aliajn afrikajn landojn, nome Alĝerio, Angolo, Egiptio, Malio, Reunio, Senegalio, Sud-Afriko, Sudano, Tanzanio, Togolando kaj Tunizio (*Esperanto en Afriko* 1970 1/1: 1).

La dua paŝo estis la instruado de la lingvo. Pro la situacio en Afriko (tion ĉi la aŭtoro tiuvorte prezentis, sen ajna klarigo) oni konsilis perkorespondajn kursojn. Verŝajne tio estis pro la malfacila atingeblo de kelkaj regionoj kaj pro la grandaj distancoj inter urboj kaj inter esperantistoj. Tie kie tamen estas lernigantoj, parolaj kursoj devos esti organizataj (Jansen 1970: 84). La praktikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo estis

Eugène Raveloson

la tria paŝo. Por helpi al la novaj esperantistoj en tio la komisionano povas kunigi ilin, okaze de kio eventuale grupoj povas esti fonditaj en diversaj regionoj. Iliaj membroj povos tiam konversacii, legi aŭ korespondi kaj se eble starigi bibliotekon. "Kiam tiaj grupoj estos maturaj, oni kunigos ilin en federacion [...]; pli poste oni kreos Landan Sekcion de TEJO." (Jansen 1970: 84)

Du jarojn poste la Komisiono pri Afriko de TEJO informas al la esperantistoj pri siaj novaj ambiciaj planoj, precipe pri la enkonduko de Esperanto-kursoj en la afrika radio (Winkler 1972: 196). Tiuj ĉi estos preparitaj en ses lingvoj kaj disvastigataj tra la tuta Afriko. Konsidere ke pri tio, kiom konate, ne aperis informoj, tiuj ĉi planoj supozeble neniam efektiviĝis. Same verŝajne estas ke la Komisono post tio trafis en silentan morton, aŭ ke ĝian laboron transprenis la Komisiono pri regiona agado de TEJO, kiu havis kiel celon prizorgi la evoluigon de la Esperanto-movado en la landoj de la t.n. Tria Mondo (Milojević 1977: 41-42).

Pro la fakto ke en la fruaj 1970aj jaroj la okcidentaj gejunuloj montris specialan interesiĝon pri la Tria Mondo, kaj ankaŭ pro tio ke Renato Corsetti (la gvidanto de la Komisiono) konsideris TEJOn (kaj UEAn) tro eŭropeca, li provis konvinki TEJOn ke ĝi devos agadi por la disvastigado de Esperanto en tiu parto de la mondo (Corsetti, pers. kom., 14/1/1999 – Corsetti 1971: 201). Por li Esperanto estas, aŭ povus esti, armilo por sin liberigi de kultura kaj lingva imperiismo. La stato de la movado en Afriko en tiu ĉi periodo estis eksterordinare malbona, ĉar la antaŭa generacio de eŭropaj esperantistoj kiuj rezidis en Afriko, estis malaperinta kaj postlasis vakuon. Esceptoj je tio estis nur Madagaskaro kaj Sud-Afriko. Estis kolektitaj adresoj de afrikaj esperantistoj kaj de homoj kiuj petis informojn aŭ estis petintaj ilin, ekzemple el la tempo de la Karavano de Amikeco (v. §2.1.). TEJO korespondis kun ili kaj sendis instrumaterialon. Kiam junaj eŭropaj esperantistoj vojaĝis al Afriko, ili kunportis materialojn por distribui kaj kelkfoje gvidis kursojn, kiel ekzemple en Tunizio kaj Ebura Bordo (Corsetti, pers. kom., 14/1/1999).

En 1974 Corsetti verkis relative longan kaj ĝisfundan artikolon pri la lingva situacio de Afriko (Corsetti 1974: 203-5), en kiu li kritikeme

esploras la ŝancojn de la movado en tiu kontinento. Nepra kondiĉo por la kreskado de la nombro de esperantistoj en Afriko, laŭ li, estas informado, kio necesigas klarajn respondojn al la demando kial afrikanoj eventuale lernos Esperanton. Corsetti sin demandas ĉu en la tuta movado jam estis iu kiu pensadis pri tiu ĉi demando. Post tio li mem provas doni kelkajn respondojn. Esperanto povus kontribui al la kresko de la interafrika solidaremo, pro tio, ke la diversaj landoj nun malfacile interrilatas, kaj al pli da fruktodonaj interŝanĝoj inter Afriko kaj la cetera mondo. Plie, ankaŭ la hobirilataj argumentoj (pli belaj ferioj, amikoj en la tuta mondo, poŝtmarkoj,…) uzataj en aliaj kontinentoj povas altiri homojn, sed ĉe tio Corsetti certigas ke li ja "havas kelkajn 'antaŭjuĝojn' rilate ĉi-lastajn argumentojn" [emfazo de Corsetti]. Tiujn ĉi li tamen ne detalas. Estas certe grave serĉi kontakton kaj kunlabori kun tiuj kiuj volas ŝanĝi la lingvan situacion bazitan sur eŭropaj lingvoj. "Ĉe la samaj homoj kaj asocioj ni povos 'testi' la validecon de niaj ideoj pri la valoro de Esperanto por afrikanoj" [emfazo de Corsetti] (Corsetti 1974: 205) .

Post tio Corsetti ellaboras planon kun celoj, liaopinie, atingeblaj en mallonga kaj en longa tempodaŭroj. Dum la tri-kvar proksimaj jaroj la movado devos okupiĝi precipe pri la landoj kie jam estas esperantistoj. Tiukaze devos ne esti malfacile aranĝi kunvenon por ke la afrikaj esperantistoj konatiĝu unu kun la alia kaj lernu kunlabori. Al Corsetti en tiu momento ankaŭ multe valoris ke oni produktu informan kaj instruan materialojn en la afrikaj lingvoj, tiel ke kiel eble plej baldaŭ la lernado de Esperanto per eŭropaj lingvoj povu ĉesi (Corsetti 1974: 205). Nome li estis konvinkita ke la plej bona politiko en Afriko estas alpreno de la rezolucioj de Unesko de la jaro 1954, rilate al la uzo de la lokaj lingvoj en la lokaj lernejoj. Pro tio, ke tiam pluraj maldekstremaj afrikaj registaroj estis farantaj timidajn provojn uzi la lokajn lingvojn, li opiniis ke oni estus povinta verki gramatikojn pri Esperanto en tiuj ĉi lingvoj. La fakto ke la situacio finfine evoluis alimaniere kaj la koloniaj lingvoj konservis siajn poziciojn ĝis hodiaŭ, laŭ Corsetti klarigas ke nun oni tamen ne uzas la afrikajn lingvojn por lerni Esperanton (Corsetti, pers. kom., 14/1/1999).

En pli longa tempodaŭro, post dek ĝis dek kvin jaroj, en Afriko devos estiĝi ia Esperanto-movado kun propra ecaro, engaĝiĝinta en la progresado de la landoj en kiuj ĝi estas aktiva (Corsetti 1974: 203-5). Tiu ĉi originaleco devos rezulti el la klopodoj adapti Esperanton al la afrikaj cirkonstancoj. Tiel tiu ĉi estonta afrika movado kontribuos al pli granda ekvilibro inter la diversaj partoj de la Esperanto-movado kaj -kulturo. Fine la aŭtoro esprimis la esperon ke "tiam la pozicioj de la Internacia Lingvo en Afriko estos sufiĉe fortaj por pluvivi kaj progresi sen bezono de elekstera helpo" (Corsetti 1974: 203-5). Tiu ĉi espero estas ankoraŭ for de plenumiĝo, kvankam kelkaj landoj havas relative memstaran movadon.

En 1975 TEJO komencis kampanjon en kiu ĝi klopodis "forigi troan teoriismon el nia agado kaj iel certigi la necesan financan bazon por subteni la disvastigon de la Internacia Lingvo en evolulandoj, aparte tie, kie ni jam havas homojn pretajn labori." Identigi tiujn homojn estis la unua tasko kiun la tiama estraro starigis al si (Azcuénaga 1975: 94). Oni opiniis pli grave ekinstrui Esperanton en la izolitaj landoj ol provi senpere fondi tie sekcion de TEJO.

2.5. UEA-strategio en la malfruaj 1970aj jaroj

Kvazaŭ daŭrigo de sia laboro ene de TEJO, Renato Corsetti, jam Komitatano de UEA, en 1974 iĝis komisiito respondeca pri regiona agado (Milojević 1977: 41-2). Lia tasko enhavis tie ĉi proksimume la samon kiel ĉe TEJO. Li estis en koresponda kontakto kun grupoj kaj unuopuloj en Afriko, Azio kaj Sud-Ameriko, kaj tiel povis konsili al UEA pri tio, kie kaj en kiu formo helpo estas dezirata (RE 1975 68/6: 108).

En tiu ĉi periodo Corsetti verkis ankaŭ la kajeron *Por la defendado de la afrikaj kulturoj*, kiun UEA–TEJO aperigis, en 1977, en la franca (*Pour la défense des cultures africaines*) kaj la angla (*In Defense of African Cultures*). En 1979 la broŝuro aperis ankaŭ en la svahila (*Kwa kulinda tamaduni za Afrika*) (RE 1979 75/12: 214). Jam el la titolo oni povas rimarki ke la argumentoj per kiuj UEA klopodis persvadi la afrikanojn pri la utilo de Esperanto, estis ne multe ŝanĝiĝintaj post 1962. La broŝuron akre kritikis Bernard Golden (ekzemple en Golden 1985: 16-7), interalie ĉar liaopinie ĝi misreprezentas la internaciecon de Esperanto.



Kwa kulinda tamaduni za Afrika, 1979

En 1977 oni konstatis ke ne estis realisme antaŭvidi ke unu sola persono (Corsetti) estos kapabla zorge atentadi la movadon en tri mondopartoj. Tial oni proponis ĉe la konsistigo de la sekva komitato ne unu personon, sed tutan komisionon aŭ diversajn laborgrupojn kiuj povos kunlabori kun Corsetti aŭ transpreni lian laboron. Krome la UEA-buĝeto devos allasi pli grandan financan helpon ol en la pasinteco, ĉar ĝis tiam la laboro de Corsetti estis financata precipe per donacoj de individuaj esperantistoj (Milojević 1977: 41-2).

Oni ankaŭ proponis ŝanĝon en la kotizpolitiko de UEA por la multaj landoj por kiuj la tarifo ankoraŭ ne estis fiksita en la loka valuto, kaj en kiuj la esperantistoj do devis pagi la kotizon laŭ la tarifo en guldenoj (la tiama nederlanda valuto), ĉar tiel fariĝis preskaŭ neeble por esperantistoj en tiuj landoj membriĝi en UEA. Unu el la sekvoj estis ke la membronombroj en la antaŭaj dudek jaroj estis dependaj precipe de la financa stato de la Propaganda Konto kaj de Fondaĵo Canuto de UEA, kiuj pagis la kotizon por la plimulto da la esperantistoj en tiuj ĉi landoj. Tiu ĉi manko de aparta kotizpolitiko por la evoluantaj landoj, laŭ la aŭtoro de la artikolo, Simo Milojević, egalis al rekta, eĉ se nekonscia, saboto de la laboro de Corsetti kaj ĉiuj aliaj kiuj klopodis firmigi la pozicion de la Internacia Lingvo en Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko. Fikso de favoraj kotizoj laŭ la aŭtoro ne estos pli ol elementa bazo por krei tutan politikon kaj ellabori detalan strategion, kies celo estos penetrigo de Esperanto en la landojn, kie la lingva problemo estas esenca malhelpo en la progreso sur la eduka, kultura kaj ekonomia kampoj (Milojević 1977: 41-2)[41].

Unu jaron poste, dum kunsido de la Estraro de UEA (21-23 de aprilo 1978), oni diskutis interalie pri Afriko. Du esperantistoj el Madagaskaro, Rakotondravao kaj Raveloson, gastis tie (Milojević 1978b: 89-90). Pro tio, ke tiu ĉi lando tiam estis pli-malpli la sola en kiu Esperanto floris, sed el kiu ankaŭ ofte venis sinkontraŭdiraj informoj (Milojević 1978a: 69-70), en tiu ĉi kunveno la stato de la movado en tiu lando estis pliklarigita al la Estraro. Malgraŭ lokaj internaj problemoj, kelkcent homoj tie sekvis ĉiujare Esperanto-kurson. Estis tamen malfacile, pro manko de internaciaj kontaktoj, vivteni ilian interesiĝon. Tial la reprezentanto de la movado en Madagaskaro petis al UEA okazigi unu el la sekvontaj UKoj en lia lando, sed tio ĉi ne estis akceptita. Oni ja promesis malpli grandan internacian kunvenon, nome la ILEI-konferencon de 1980. UEA ankaŭ estis preta financi apartan informilon por afrikaj esperantistoj, kiu estis eldonota en kaj distribuota el Madagaskaro (Milojević 1978b: 89-90).

Bedaŭrinde la ILEI-konferenco ne povis okazi en Madagaskaro pro tio ke la registaro ne deziris akcepti ĝin (Orellana, pers. kom., 8/2/2007; Sonnabend, 1980: 1), kaj ankaŭ pri la ekzisto de la informilo ni ne sukcesis trovi spurojn.

2.6. De regiona al afrika agado

La planita pliigo de la homforto por la propagandado de Esperanto en Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko estis realigita nur dum la UK de 1980 en Stokholmo. Renato Corsetti okazigis kunvenon por la multaj interesitoj pri "regiona agado", ĉe kiu li parolis tiel entuziasmige ke diversaj homoj proponis sian kandidatecon por sin dediĉi al difinita regiono en kiu ankoraŭ ne ekzistis nacia Esperanto-asocio. Inter ili estis ankaŭ la nederlandano Hans Bakker, kiu en la jaroj 1960-70 aktivis kadre de TEJO koncerne la lingvajn minoritatojn kaj kulturan sendependecon. Oni fondis komisionon, en kiu li kunrespondecis pri Afriko kaj Sud-Ameriko. Jam baldaŭ la aliaj ĉesis, kaj post la konsciiĝo ke tiuj ĉi du kontinentoj estas tute malsamaj, Hans Bakker post kelkaj monatoj plu okupis sin nur pri Afriko. Li fariĝis la Komisiito de UEA pri Afriko (Bakker, intervjuo, 18/1/1999 kaj pers. kom., 14/4/1999) (v. §3.).

3. Evoluo de la movado ekde 1980

Tiu ĉi ĉapitro traktas nur pri fortolinioj de la afrika Esperanto-movado dum la pasintaj du jardekoj, t.e. ĝeneralaj evoludirektoj kaj okazintaĵoj kiuj gravas por la tuta afrika movado kaj ties strategia planado el Eŭropo. La afrikaj kongresoj estas priparolataj en aparta ĉapitro (v. §4.).

3.1. Komenco de la afrika agado

Kiam Hans Bakker kaj kelkaj helpantoj troviĝis antaŭ la tasko propagandi Esperanton en Afriko el Eŭropo, ili frapiĝis kontraŭ pesimismo ĉe la eŭropanoj kiuj memoris la Karavanon de Amikeco (v. §2.1.) kiel agadon kiu postlasis ne multajn spurojn, kaj diris ke afrikanoj tro rapide perdas sian interesiĝon (Bakker, intervjuo, 18/1/1999). Sed ili persistis kaj la unua paŝo konsistis el varbado de homoj kaj aranĝado de perkorespondaj kursoj (Bakker 1989).

Ekzemple en Tanzanio kaj Kenjo, Nino Vessella aperigis, en la jaroj 1981 kaj 1983, anoncetojn pri Esperanto en lokaj gazetoj: *Taifa Leo* kaj *Taifa Weekly* en Kenjo, kaj *Uhuru* en Tanzanio. Venis centoj da reagoj, kaj la interesitoj ricevis respondon en la svahila kaj la broŝuron *Kwa kulinda tamaduni za Afrika* (v. §2.5.). Homoj kiuj reagis al tiu ĉi broŝuro ricevis la lernolibreton *Jifunze lugha ya Kiesperanto*[42], verkitan de Vessella surbaze de *Esperanto for Beginners* de C. Butler, kaj anglalingvan ŝlosilon. Speciale por tiuj unuaj lernantoj,


Nino Vessella

esperanto

jifunze lugha ya kiesperanto

universala esperanto-asocio
nieuwe binnenweg 176
nl-3015 bj rotterdam
uholanzi

Jifunze lugha ya Kiesperanto, 1983

TANGAZO
Unakabiliwa na Ubaguzi wa Lugha?
Agiza kijitabu (bila malipo)
"KWA KULINDA TAMADUNI ZA AFRIKA"
toka:
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
-U.E.A.
NIEUWE BINNENWEG 176,
3015 BJ ROTTERDAM,
HOLAND.

Anonco en *Uhuru*, Tanzanio, 1983

Vessella, nome de UEA, kaj kun helpo de Bakker, komencis eldoni bultenon en aprilo 1982 (Vessella, pers. kom., 14/3/1999; Bakker 1982: 125).

Ankaŭ en Okcidenta Afriko la komenco estis sukceso, kaj tio rezultis laŭ Bakker unuflanke el la deziro de la afrikanoj rilati kun la blankula, t.e. riĉa mondo, sed aliflanke ankaŭ el la deziro povi rigardi trans la horizonton, movi siajn limojn kaj ekkoni la mondon. La komenco do estis facila, sed post mallonga tempo la afero fariĝis malpli facila, ĉar la homoj ne ĉiufoje montris havi la talenton daŭrigi, kaj ankaŭ komprenis ke la lernado de Esperanto ne estas maniero por fariĝi riĉa (v. ankaŭ §3.3.) (Bakker, intervjuo, 18/1/1999).

Jam en 1984 estis fakte tro multaj interesitoj, kaj estis akcentataj precipe la uzado kaj la plulernado de Esperanto. La respondo al la demando, kion per ĝi ili povas fari, estis: korespondi, ĉar ili ne havas monon por ĉeesti kongresojn aŭ aĉeti librojn. Tial UEA faris al ili unikan oferon: la repagon de la afrankoj. El la serĉado de korespondantoj por tiuj afrikaj esperantistoj rezultis sistemo (ĝemelado) ĉe kiu inter du kluboj estiĝas intensa ligo per grupopa korespondado (ekz. inter svedaj kaj tanzaniaj kluboj). Kiam tiu ĉi reto ankoraŭ estis superrigardebla, oni eldonis revueton por la neafrikaj kluboj, kiuj tiel povis interŝanĝi spertojn. Oni ankaŭ debatis en ĝi pri ekzemple afrikanoj kiuj nur petis servojn aŭ monon en siaj leteroj (Bakker 1989). La revuo nomiĝis *Bulteno por Ĝemelantoj kaj Korespondantoj* kaj aperadis duonjare de 1982 ĝis 1988 (Bakker, pers. kom., 21/2/1999).

3.2. Salta ekapero sur la internacian scenejon

Post proksimume 6-7 jaroj kelkdekoj da afrikaj lernantoj bone regis Esperanton, sed la cetero de la Esperanto-movado malmulte sciis pri tio. Kelkan tempon antaŭ la jubilea kongreso en 1987, UEA kaj Hans Bakker

do pensis fari dum tiu ĉi kongreso specon de elmontrado de la sukceso de Esperanto en Afriko. Ili faris tion ĉi invitante afrikajn esperantistojn al la venonta Universala Kongreso (Bakker, intervjuo, 18/1/1999).

En tiu tempo la eŭropaj ŝtatoj ankoraŭ pli facile havigis vizojn por vojaĝi kaj pro tio ke afrika agado tiam estis nova kaj populara temo, Fondaĵo Afriko ricevis ankaŭ sufiĉe da donacoj, tiel ke dek tri afrikanoj povis esti invititaj (kvankam laŭ la Kongresa Libro aliĝis 17 afrikanoj). Unue ili partoprenis kvinsemajnan preparan seminarion en Budapeŝto, kien ili estis invititaj de Hungara Esperanto-Asocio. Tiu ĉi povis organizi kaj financi ĝin pro tio ke ĝin subvenciis la hungara ŝtato. La afrikanoj ne nur rabotis en ĝi sian scion de la lingvo, sed ankaŭ lernis uzi la Csehmetodon (Bakker, intervjuo, 18/1/1999). Post la seminario la afrikanoj ĉeestis la Internacian Junularan Kongreson en Krakovo, kaj poste la Universalan Kongreson en Varsovio. Tio ĉi forte impresis ilin, sed aliflanke ankaŭ ilia ĉeesto forte impresis la aliajn esperantistojn. Multaj Esperanto-gazetoj publikigis poste intervjuojn kun kaj fotojn de ili (Bakker, intervjuo, 18/1/1999).

Dum tiu ĉi kongreso Hans Bakker gajnis la premion Onisaburo Deguĉi, kiu estis transdonita tiam unuafoje kaj kiu konsistis el 4000 guldenoj (preskaŭ €2000). Ĝin sponsoras la Esperanta Propaganda Asocio de Oomoto, kiu volas stimuli per ĝi agadojn per Esperanto por interhoma paco kaj kompreno. Hans Bakker emfazis en la ceremonio ke "la utiligo de Esperanto kaj pli gravas kaj pli malfacilas por afrika movado, kiu nepre bezonos vastan solidaran helpagadon por realigi sian potencialon" (RE 1987 80/9: 161). Ne longe poste li estis plukondukonta tiun ĉi linion en artikolo kiu ĝis nun restas por li kaj UEA la gvidlinio por agado en Afriko (v. §3.3.).

Afrikanoj kun UEA-Estraro, UK 1987



Hans Bakker ricevas la premion Deguĉi, UK 1987.

Ankaŭ en 1988 afrikanoj estis invititaj kaj al la Universala Kongreso en Roterdamo kaj al aliaj Esperanto-kunvenoj, antaŭkongresaj kaj post-kongresaj. Ĉi tiun fojon ankaŭ Simba Mramba el Tanzanio estis inter ili. Lian vojaĝon al Eŭropo subvenciis Unesko. Lia respondo al mia demando, kia li trasentis la kongreson, estas pruvo ke la aliaj kongresanoj estis impresataj de la afrikanoj. Nome li ne havis liberan momenton, daŭre oni starigis demandojn al li kaj igis lin rakonti. Unu sviso estis tiom impresita ke li volis ĉirkaŭbraki Simba Mramba (Mramba, intervjuo, 27/8/1998).

En la sekvaj jaroj preskaŭ ĉiam afrikanoj partoprenis la UKon. Ekzemple, en 1991 la tanzaniano Costantine Mashauri ricevis Unesko-subvencion por partopreni la UKon tiujare (*Esperanto* 1991 84/9: 173). La entuziasmo de la neafrikaj esperantistoj estis tamen malvarmiĝinta, tiom eĉ ke Yao Afantchao-Biakou, tiam Prezidanto de la Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE), respondis al mia demando pri liaj spertoj dum UK ke li havas la senton ke oni dum la UK en Montpeliero (1998) volis komprenigi al la afrikanoj: "Vi tiuj partoprenantoj el nepagipovaj [landoj – nia aldono], vi fariĝas ade pli ĝenemaj [tiel]".

Ankaŭ la donacoj al Fondaĵo Afriko estas malpliiĝintaj (Bakker, pers. kom., 26/4/1999).

En 1989 oni komencis firmigi la komenciĝantan memstariĝon de la movado en kelkaj afrikaj landoj transdonante pli da respondeco al iliaj naciaj Esperanto-asocioj. Ili ricevis tiukaze la subtenon de UEA ĉe sia centra adreso anstataŭ ĉiu aparte kaj estis mem respondecaj pri ĝia enlanda distribuado (Bakker 1990a: 3). Ekzemploj estas Togolando, Kongo kaj Madagaskaro (Bakker, pers. kom., 26/4/1999).

3.3. Strategia Plano de UEA

En septembro 1989 Hans Bakker publikigis broŝureton titolitan *Por plia jardeko da Esperanto en Afriko*, kiu en januaro 1990 estis grandparte represita en *Esperanto* (Bakker 1990a: 2; Bakker 1991: 1). Ĝi estis destinita kiel aldono al la "Strategia Plano" de UEA de 1988-89 kaj daŭre estas la struktura bazo por la UEA-strategio rilate Afrikon (Bakker 1990a: 2, kaj pers. kom., 14/4/1999).

Post preskaŭ dek jaroj da afrika agado Hans Bakker emfazis en ĝi la grandan gravon de la memstarigo de la asocioj (v. §3.2.) kaj de la utiligado de la lingvo, multe super nuraj varbado kaj instruado al novaj lernantoj. Kvankam tiuj ĉi lastaj du okazas ankaŭ en Eŭropo, ili estas des pli malutilaj en Afriko, ĉar UEA ne povas subvencii pli da lernantoj kaj kluboj. La varbado devas des pli esti malkuraĝigata ĉar tro multaj homoj erare komprenas ke per Esperanto ili povas akiri (porvojaĝajn) stipendiojn, laboron, materiajn avantaĝojn aŭ eĉ edzinon (ĉi-lasta montriĝas el diversaj aliaj fontoj kaj pers. kom.). Do laŭ Hans Bakker ekzistas granda bezono, ne je pli da esperantistoj, sed je pli bonaj. Tial la Esperanto-lecionoj por progresintoj devas ricevi prioritaton al tiuj por komencantoj (Bakker 1990a: 3).



Costantine Mashauri kaj H. Bakker, UK 1991

Afrikanoj en UK

La grandnombra kaj surpriza partopreno de afrikanoj en la Jubilea Universala Kongreso (1987) povus doni la falsan impreson ke la menciita kongreso estis la sola kun [rimarkinda] afrika partoprenantaro.

Se oni akceptas ke ankaŭ la eŭropaj pioniroj de Esperanto en Afriko estas "afrikaj esperantistoj", tiam jam la Bulonja kongreso povis fieri pri afrika partopreno. Auguste Capé-Montrosier, tiam loĝanta en Alĝerio, gvidis la diskuton pri tiam aktualaj demandoj (Sikosek 2005: 33). Laŭ lia raporto en *La Alĝeria Stelo* (Landes 1905b: 1-2) oni povas kompreni ke ankaŭ Ludoviko Landes partoprenis en la sama kongreso.

Ni trovis en la konsultita bibliografio ke ĝis la dua mondmilito preskaŭ ĉiujare listiĝas afrikaj aliĝintoj, plejparte el nordafrikaj landoj – kun la sola escepto de Sud-Afriko. La unua 'indiĝeno', Nasif Mahrus, reprezentas sian landon Egiption en la mezaj 1930aj jaroj.

Ekde 1948, lia samlandano Nassif Isaac dum jardekoj estis regula partoprenanto en UKoj (Isaac 1967); al li aldoniĝas, en la mezaj 1950aj jaroj, Tadros Megalli, kiu aperos intermite jen sub sia devenlando, jen sub sia adoptlando, Germanio.

La cetera Afriko ekreprezentiĝas en UK en la fruaj 1950aj jaroj, plejparte per eŭropanoj loĝantaj tie. Inter ili, tri kongresoj registris po pli ol 20 aliĝintojn, superote nur de la UK en 1988, kun rekorda nombro de afrikaj aliĝintoj (31).

Laŭ Milojević (1978: 69), en la 1960aj jaroj la sola afrikano en UKoj estis la maliano Ibrahim Tambura. En la 1970aj jaroj komencis transpreni tiun rolon la burundiano Justin Minani. Tamen, kiel ofta aliĝinto, en la jaroj 1960-70, aperas la madagaskarano Eugène Raveloson. Alia ofte aperanta aliĝinto, en la jaroj 1970-80, estas la kongano N.-B. Ngangu.

Ibrahim Tambura (dekstre), UK 1963

Same kiel en la historio de Esperanto en Afriko ankaŭ rilate al UK oni rimarkas la evoluon de nur eŭropaj al preskaŭ nur indiĝenaj "afrikaj partoprenantoj".

[Noto: La fontoj jen kaj jen malkongruas pro la fakto ke en kelkaj oni mencias la nombron de aliĝintoj, dum en aliaj la nombron de partoprenantoj. Tiuj ĉi ciferoj ofte malsamas pro tio ke la efektiva partopreno dependis ofte de la facilo kun kiu la koncerna lando havigis vizojn. La sinretenemo laŭ kiu precipe okcidenteŭropaj landoj faris tion dum la lastaj jaroj, povas eble esti klarigita per la fakto ke jam pluraj afrikanoj post la UK restis en Eŭropo kaj petis la statuson de politika rifuĝinto (inter aliaj Anita Dagmarsdotter, pers. kom., 8/4/1999 kaj laŭ persona sperto). Alia kialo por la malkongruo estas la fakto ke ne ĉiuj fontoj uzas la saman kriterion por difini afrikanon (ŝajnas ke en multaj okazoj oni konsideris afrikano nur nigran afrikanon, neglektante nordafrikanojn).]

La utiligado de la lingvo por afrikanoj povas ĉefe konsisti el nur korespondado kaj loka kluba vivo. Per la unua oni povas sperti internacian amikecon kaj interŝanĝi praktikajn servojn. En la klubo oni povas kune partopreni aktivaĵojn, kiuj kreas senton de komuneco, kaj ekhavi la senton de agado en internacia mondo. Plie valoras ankaŭ la funkciado de la klubo en la vasta socio, por elgajni respekton de tiu ĉi (Bakker 1990a: 4).

3.4. Evoluo ekde 1990

3.4.1. Kongresoj kaj periodaĵoj

La unua duono de la 1990aj jaroj estis karakterizata de kvar afrikaj kongresoj (v. §4.). Ankaŭ tiuj ĉi konsistigis parton de la plua memstariĝo de la movado, kvankam oni reguligis ankoraŭ multon el Eŭropo kaj ilin praktike komplete subvenciis UEA kaj la eŭropaj partoprenantoj. Ĉiukaze la movado dum tiuj ĉi jaroj povis pluevolui pozitive, pro la reciprokaj kontaktoj dum la kongresoj. Tiu ĉi stimulo nun jam pli ol tri jarojn ne ekzistis, sed en kelkaj landoj la manko estas moderigata de naciaj kongresoj. Ekzemplo estas Togolando, sed ankaŭ Madagaskaro, kie en 1996 oni organizis la Unuan Interinsulan Esperantistan Kongreson (RE 1997 90/6: 110-111).

Ankaŭ la pejzaĝo de la Esperanto-gazetoj de kaj por Afriko en tiuj ĉi jaroj multe ŝanĝiĝis. 1992 estis la lasta jaro de la tanzania revueto *Orienta Stelo*, sed la unua jaro de *Afrika Reto*, redaktata de la brita Katelina Hall. Ĝi estas destinita al afrikaj esperantistoj kiuj volas aperigi poezion aŭ prozon en Esperanto. Aliaj povos poste sendi sian komenton pri tiuj poemoj aŭ prozaĵoj al la revuo. La verketo kiu ricevas plej multan laŭdan kritikon, fine akiras premion (Hall 1992: 1). La fakto ke la revueto daŭre pluekzistas, indikas ke jam sufiĉa nombro de afrikaj esperantistoj atingis relative altan lingvan nivelon.

En majo 1981 aperis la nula numero de *Esperanto en Afriko,* tute senrilata al la revuo aperinta en 1970. Poste oni eldonis ĝin sub la titolo *Espéranto en Afrique* kiel aldonaĵon al la belga informilo *Espéranto en marche*. Ekde januaro 1988 ĝi fariĝis sendependa kaj reaperis sub la nomo *Esperanto en*

Afriko. Ĝi estis destinita precipe al esperantistoj en la eksaj francaj kolonioj. Aparte de la nula numero, kiu estis verkita tute en Esperanto, oni povas rimarki en ĝi evoluon de preskaŭ komplete franclingvaj numeroj, al komplete esperantlingvaj numeroj. Ĝi lastfoje aperis en majo 1994. Samrolulo por la eksaj kolonioj de Britio estis parteto de la irlanda revuo *Esperanto en Irlando* (de februaro-marto 1985 ĝis marto-junio 1987), kiu pro tio ekde julio 1987 ricevis la nomon *Irlandafrika Esperantisto*. Ĝi ĉesis aperi en 1992.

En 1994 kaj 1995 aperis po unu numero de *Junulara Magazino Togolanda*, kompilita de junaj membroj de la togolanda klubo C-21. En 1994 aperis unuafoje ankaŭ la togolanda revueto *Ondo da Vero* (oficiala organo de TIETo – TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando) kaj la sekvan jaron *Alvoko* (oficiala organo de UTE) kiuj ambaŭ daŭre estas eldonataj.

Tiuj ĉi ripetaj ekaperoj kaj malaperoj de Esperanto-gazetoj en aŭ por Afriko estas nur unu ekzemplo de la nestabileco de la movado en tiu kontinento, kvankam la (ne-)aperadon de revuetoj certe rezultigis ankaŭ la ŝanceliĝa interesiĝo de la eŭropaj esperantistoj. Kelkaj landoj tamen certe ne plu bezonas tian subtenan revuon kiel *Esperanto en Afriko* aŭ *Irlandafrika Esperantisto*. Sed eble revuo por la tuta kontinento povas ja esti utila por landoj kun ekanta movado kiuj en internaciaj revuoj trovas tro malmultajn praktikajn ideojn por plukonstrui ĝin. Por tio tamen estas bezonataj tiom da tempo kaj mono de eŭropaj esperantistoj, ke se tiuj ĉi ja estus disponeblaj, ili pli bone estus investitaj en aliaj manieroj, ekz. por plibonigi kaj plukonstrui "ĝemelajn rilatojn". Krom tio aperas en ekz. *Kontakto* plej ofte kaj *TEJO Tutmonde* foje artikoloj de afrikanoj, kaj tiuj ĉi gazetoj, same kiel *Esperanto*, estas sufiĉe vaste legataj en Afriko.

3.4.2. Reorganiziĝo

La Estrara Raporto de 1997 (RE 1998 91/6: 110) sciigis ke necesas reorganiziĝo de la rilatoj inter UEA kaj la afrika movado. Estis proponite unue ke la riĉaj landoj pli kaj pli anstataŭu UEAn kaj ĝian Komisiiton pri Afriko, Hans Bakker, en la kulturado de la rilatoj kun Afriko. Ankaŭ tie ĉi la ĝemelaj kluboj povus ludi gravan rolon. Due, Afriko mem devus transpreni la zorgon pri sia movado. Tial fine de 1997 – komence de

1998, la togolandano Raoul Hounnake faris staĝon ĉe UEA. Li pristudis la eblon, ke la togolanda movado transprenu parton de la laboro de Bakker. Krom tio ĉi, nenio konkreta realiĝis ĝis nun, sed oni ankoraŭ daŭre debatas pri ĝi en la Centra Oficejo en Roterdamo (Bakker, pers. kom., 26/4/1999).

Sed dum la UK de 1998 unuafoje afrika esperantisto estis elektita membro de la Estraro de UEA, nome la togolandano Koffi Gbeglo (Buller 1998: 148). Samtempe li estis nomumita respondeculo pri afrika agado.



Koffi Gbeglo

En letero de 23/4/1999 al la Sekretario de UEA, Michela Lipari, Gbeglo klarigas, kio estos, post interparoloj kun diversaj koncernatoj, lia labortereno. Li volas pli da kunlaborantoj por la afrika agado kaj varbi pli da donacantoj por la Fondaĵo Afriko. Plie valoras solvi kaj evitigi problemojn inter afrikaj esperantistoj de sama lando. Krome restas necesa la strebado al memstareco de la afrika movado (Gbeglo, pers. kom., 6/4/1999).

4. La afrikaj kongresoj

Enkonduko

UKoj okazas plej ofte en Eŭropo (72 fojojn el 83 UKoj) (JL de UEA 1998), kaj pro tio homoj el aliaj kontinentoj malpli ofte havas okazon partopreni tiujn ĉi. Tial gravas por ili povi ĉeesti kontinentajn kongresojn. Ekzemple, la unua latinamerika kongreso okazis jam en 1978, en Marilio, Brazilo, kaj la unua azia kongreso, en 1996, en Ŝanhajo, Ĉinio.

Afrikaj kongresoj realiĝis nur post ripetaj petoj de afrikanoj pri okazigo de UK en ilia kontinento. Dum la UK de 1987 oni petis la Komitaton de UEA pensi pri la propono de la juna Eburborda Esperanto-Asocio organizi UKon en Ebura Bordo. La Komitato opiniis ke la tempo por tio ankoraŭ ne maturiĝis, sed promesis organizi iom pli modestan kunvenon en tiu regiono (Bakker 1990b: 29-30). Dum la UK de 1989 en Brajtono, oni decidis okazigi la unuan afrikan kongreson en Togolando (laŭ letero de UTE al Marcel Delforge, 5/1/1990). Ekde tiam ankaŭ la kvara afrika kongreso jam estas pasinta.

En §4.1 estos traktataj la organizo kaj la disvolviĝo de tiuj ĉi kvar kontinentaj kongresoj. Post tio sekvas kelkaj komparoj kaj postkonsideroj en §4.2.

4.1. Organizo kaj disvolviĝo de la afrikaj kongresoj

4.1.1. Unua Afrika Kongreso, Notse, Togolando

27/12/1990-2/1/1991, Temo: "Esperanto en la tria mondo: kia estonteco por Esperanto en Afriko?"

Por sin prepari por tiu ĉi unua afrika kongreso, UTE organizis martofine de 1990 la unuan nacian kongreson. Post kelkaj ŝanĝoj rilate la datojn kaj la daŭron de la kontinenta kongreso, fine kunvenis por tiu ĉi 104 esperantistoj, el kiuj 97 afrikanoj (el Benino, Ganao, Niĝerio, Togolando kaj Ebura Bordo), ses eŭropanoj kaj unu amerikano. Laŭ la programo ĝi ege similis Universalan Kongreson, kun interkona vespero, solena mal-

fermo, voĉlegado de salutmesaĝoj kiuj estis skribe alvenintaj, paroladoj de diversaj afrikaj funkciuloj, salutoj al la kongreso far la eksterlandaj gastoj kaj solena fermo kun voĉlegado de la kongresrezolucioj (Maxwell 1991: 21).

Dum la malfermo parolis Dan Maxwell, reprezentanto de UEA, interalie pri la mono kiun li kunportis por kovri la kostojn de la kongreso: "Eblas starigi la jenan demandon: kial UEA pretas elspezi monon por okazigi Esperanto-kongreson ĉi tie? Jen la respondo: unue, ĉar UEA celas disvastigi Esperanton tra la tuta mondo, ne nur en Eŭropo. Due, ĉar decas, ke relative riĉa mondparto elspezu monon por evoluigi relative malriĉan mondparton, kaj nuntempe Eŭropo estas relative riĉa kaj Afriko relative malriĉa mondparto." (Tietti 1994: 4)

UEA do finance subtenis la kongreson por helpi progresigi la afrikan Esperanto-movadon. Fakte, ĝis nun eĉ ne unu kontinenta aŭ nacia Esperanto-kongreso en Afriko estas financita tute de la afrikaj esperantistoj mem.

Iom malpli kutimaj programeroj (kompare kun UK-programoj) estis la prezento far kelkaj partoprenantoj de siaj religiaj aŭ ateismaj konvinkiĝoj, piedpilkkonkurso kaj scikonkurso (speco de kvizo). Je la 31a de decembro

Partoprenintoj de la Unua Afrika Kongreso en Togolando

oni parolis, dum debato pri la kongresa temo, pri la argumentoj por lerni Esperanton kaj pri la utilo kiun oni povas tiri el ĝi (Gbeglo 1991: 6).

La sekvo estis rezolucio en kiu, interalie, oni petis la afrikajn registarojn helpi vigligi la Esperanto-klubojn kaj asociojn en siaj respektivaj landoj, subtentante ilin morale, materiale kaj laŭeble finance, decidis ke afrika kongreso okazos ĉiun jaron kun perfektigaj kursoj, kaj kuraĝigis la afrikanojn scii la diversajn kampojn de la utiligado de Esperanto kaj entuziasmigi la rilatojn inter si mem kaj kun aliaj. Kiel kvinan punkton oni ratifis ke UKoj devos okazi ankaŭ en Afriko, komence de tiu en 1995. Kiel lastan punkton oni atentigis pri tio ke la afrikaj Esperanto-asocioj devos klopodi fariĝi memstaraj (Gbeglo 1991: 4). La problemo de la financa memstareco ankoraŭ daŭre estas nesolvita.

Ekzemplo de sekvo de la dependeco de la afrikaj Esperanto-asocioj estas ke, kiam dum la kongreso estis farita la propono organizi afrikan kongreson denove en la sekva jaro, ne ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj pro tio ke la afrikanoj ne mem povos pagi ĝin kaj la rimedoj de UEA denove estas elĉerpitaj por kelka tempo. Estos tiel, ke nur per la kotizado de la neafrikaj partoprenantoj ankaŭ afrikanoj povus partopreni la okazaĵon (Maxwell 1991: 22). Por tiuj ĉi neafrikanoj sekvis post la kongreso sestaga kultura rondvojaĝo tra Ebura Bordo, organizita de esperantistoj de tiu lando (Gbeglo 1991: 5).

4.1.2. Dua Afrika Kongreso, Cotonou, Benino

28-31/12/1991, Temo: "La rolo de Esperanto por la turismo en Afriko"

Kvankam estis interkonsentite dum la unua kongreso igi la duan daŭri same longe kiel la unua, tiu ĉi finfine daŭris nur tri tagojn kaj poste sekvis postkongreso (precipe por eŭropanoj) kaj oktaga vizito al Ebura Bordo. La kongreso estis subvenciita de UEA kaj de la fondaĵo Friedrich Naumann[43], kaj kunvenigis 90 esperantistojn (*Esperanto en Afriko* 1992 6/2: 2). Tiuj estis 71 afrikanoj (krom el Benino kaj Togolando ankaŭ el Senegalio, Ganao, Ebura Bordo, Niĝerio kaj Gabono) kaj 19 eŭropanoj (interalie el Nederlando, Germanio, Belgio, Svedio kaj Finnlando), inter

kiuj la tiutempa Ĝenerala Direktoro de UEA, Simo Milojević. Partoprenis nur 35 esperantistoj el Benino mem, pro tio ke ankaŭ ili devis pagi kotizon (Milojević 1992: 4). La afrikaj esperantistoj estis fascinitaj ke inter la eŭropanoj estas ankaŭ pli aĝaj virinoj, ĉar ili ade suferis kulpigojn pri la fakto ke Esperanto estus afero de infanoj kaj gejunuloj, kaj pro tio ili ne estis traktataj kiel seriozaj (Milojević, intervjuo, 6/4/1999).

Dum la malfermo oni parolis multe, pro la ĉeesto de la televido, sed nenie oni povas trovi ion pri la enhavo de la malferma parolado, nek multe pri la cetera enhavo de la kongreso. Laŭ raportoj (pli bone diri: plendleteroj) de kelkaj eŭropaj partoprenantoj, ankaŭ ne multe el la oficiala programo okazis. Oni efektive okazigis balotadon, sed la estraro estis reelektita helpe de dolĉaj trinkaĵoj kiel subpago (Milojević 1992: 4). Neniu rezolucio estis akceptita (Bakker, pers. kom., 14/4/1999).

4.1.3. Tria Afrika Kongreso, Winneba, Ganao

23/12/1994-2/1/1995, Temo: "Demokratia afrika kulturo kaj Esperanto"

Tri jarojn post la dua kaj unu jaron pli poste ol antaŭvidite, la tria afrika kongreso okazis en Ganao. La longa atendado ne okazis pro manko de entuziasmo, sed pro tio ke la subvencio de UEA ne permesis la organizadon de nova kongreso (Bakker 1994b: 178). Du jarojn antaŭe la ganaaj esperantistoj okazigis sian unuan nacian kongreson, kun 32 partoprenantoj (Bakker 1993: 88). Dum la tria kontinenta kongreso 48 esperantistoj kunvenis el dek unu landoj kaj tri kontinentoj (krom el Afriko kaj Eŭropo, ankaŭ el Sud-Ameriko) (Orellana 1995: 41). Unuafoje ankaŭ reprezentanto el orienta Afriko ĉeestis, nome kongano kiu loĝis tiam (kaj daŭre loĝas) en Tanzanio (Minani G. Matabaro, pers. kom., 6/9/1998).

La multe malpli granda nombro de partoprenantoj estas miriga, se oni konsideras la fakton ke la kongreso okazis en la sama regiono kiel la du antaŭaj kaj ke la lasta pasis jam antaŭ tri jaroj. Tio ĉi rezultis ĉar nur du togolandanoj vere partoprenis. Ĉar ili ĉiam konsistigis grandan

Partoprenintoj de la Tria Afrika Kongreso en Ganao

proporcion, tio klarigas la malgrandan totalon. Sed kial ili ne partoprenis grandnombre? Ankaŭ tio ĉi ne rezultis el manko de entuziasmo, sed pro decido de Ganaa Esperanto-Movado (GEM). Tiu ĉi sciigis oktobrofine al UTE ke estos loko por nur du togolandaj esperantistoj anstataŭ la antaŭe anoncita dudeko. UTE akceptis tiun ĉi decidon, respondante ke tio ĉi ne estas ĝia (= tiu de GEM) volo, sed tiu de la kongresa kaso. Ili tamen ne povis elekti du el siaj membroj kaj tial ili decidis sendi neniun (Gbeglo 1995: 3-4). Finfine tamen kvar iris. Poste en *Ondo da Vero* aperis artikolo por klarigi kial la interkonsento farita kun la kluboj ne estis plenumita (TIETo 1995: 4-5). Du anoj de la UTE-estraro havis la devon iri kiel membroj de la ekzamena komisiono de la kongreso kaj du aliaj estis persvaditaj kaj subvenciitaj de la germana Annsybill Kamphausen por tamen partopreni. Ŝi argumentis ke ŝi sentus sin ofendita se neniu togolanda esperantisto irus al Ganao por partopreni la diskutojn laŭ ŝi tre gravajn por la afrika movado. Ĉiukaze tiuj ĉi observantoj (ili ne estis tie kiel reprezentantoj de UTE) povis en tiu ĉi maniero doni klarigon al la aliaj kongresanoj, kiuj, laŭ TIETo, estis neĝuste informitaj pri la konduto de UTE (TIETo 1995: 4-5).

La kongresaj debatoj traktis pri la komunikado inter afrikanoj kaj homoj de aliaj kontinentoj, la stato kaj la evoluo de la movado en diversaj afrikaj landoj ktp (Orellana 1995: 41). La grava diskuto pri kiu Kamphausen parolis, estis tiu pri la fondo de iu Afrika Esperanto-Movado, proponita

de Adanou Efoe. Laŭ Kamphausen tutkontinenta Esperanto-organizaĵo povus helpi la naciajn asociojn fariĝi kulture pli memstaraj, ĉar ŝi ne akordis pri tio ke la programo de la afrikaj kongresoj estas nur kopio de tiu de la UKoj. Sur kultura tereno la sendependiĝo tamen jam estis komenciĝinta, ĉar tiam la naciaj asocioj jam estis liberaj fari tion kion ili volis. Nur finance ili devis kaj devas limigi sin je la subvencioj de UEA kaj ili do dependas de Eŭropo (Gbeglo 1995: 3). Koffi Gbeglo, tiam Vicprezidanto de UTE, plie skribas en tiu artikolo ke bonŝance la plano ne estas efektivigita, ĉar ĝi estus plenuminta nur la ambicion de kelkaj homoj. Tio ĉi estas ankaŭ la opinio de Hans Bakker, kiu ankoraŭ nun kontraŭstaras la ideon. La estraranoj de tia kontinenta asocio, laŭ li, ne sufiĉe proksimus al la individuaj esperantistoj kaj al la Esperanto-kluboj, kaj do ne progresigus la movadon, sed nur farus gravajn figurojn el si mem (Bakker, intervjuo, 18/1/1999 kaj Bakker 1990a: 3).

La kongreso ankaŭ estis fiksinta al si du agadcelojn: volontulan laboron kaj pliprofundigon de la lingvaj konoj. La unua estis rearbariga projekto, sed tiu povis okazi nur simbole ĉar evidentiĝis, ke ne estas la taŭga sezono (Orellana 1995: 41). Tamen antaŭ tio ankaŭ aliaj projektoj estis proponitaj, kiel la konstruado de puto (Bakker 1994a: 83). Estas ne klare pro kio tiuj ĉi ne efektiviĝis. La dua projekto estis pli fruktodona. Ĝi konsistis el seminarioj je komenca kaj progresa niveloj pri la Cseh-metodo. La partoprenantoj lernis produkti instruilojn kaj didaktikajn ludojn. Antoine Kouassi Kouablan fariĝis la dua afrika Cseh-instruisto. Kvankam ne planite, realiĝis ankaŭ Esperanto-kurso por studentoj de la loka universitato, kiuj montris intereson pri tio (Orellana 1995: 41).

La akceptita rezolucio (Halaoui 1995: 8) multe similis la unuan, sed havis kelkajn kromajn erojn. Oni decidis ke afrikaj kongresoj estonte okazu ĉiun duan jaron, sed la sekva jam post unu jaro. Esperplene oni skribis en la rezolucion ke la Universala Kongreso en la jaro 2000 okazu en Afriko, sed tiu ĉi espero estas jam nun vaporiĝinta (v. §4.2.). La sepa punkto temis pri la programo, kiu, krom mallongaj prelegoj, estonte enhavu ankaŭ diskutgrupojn, kantojn kaj ekskursojn. Pro la malgranda nombro de eblaj partoprenantoj tiun jaron, pro manko de financoj – en kombino kun la fakto ke tiuj malmultaj tiam ja gastis en hoteloj kaj

ricevis multekostan nutraĵon (Gbeglo 1995: 3) – oni skribis en la rezolucio ke, por ŝpari monon kaj por ebligi kiel eble plej grandan nombron de partoprenantoj, la kongreso devos okazi en malaltprezaj lokoj, kiel universitatoj aŭ lernejoj, anstataŭ en multekostaj hoteloj.

Rilate al la disvolviĝo de tiu ĉi kongreso venis ankoraŭ pli da opiniaj reagoj ol tiuj jam menciitaj. Kvankam neniu el la kvar esperantistoj kiuj venis el Togolando povis aŭ volis reprezenti UTEn, tiu ĉi instanco tamen estis reprezentata, nome de togolandano kiu jam de kelka tempo estis loĝanta en Ganao (la antaŭe menciita Adanou Efoe). Ebura Bordo estis reprezentata de togolandano kiu, post periodo en Ebura Bordo, nun ankaŭ estis loĝanta en Ganao (Antoine K. Kouablan). Minani G. Matabaro reprezentis kaj sian devenlandon (Kongo), kaj sian tiaman hejmlandon (Tanzanio) kaj Ruandon kaj Burundion. Parfo Ajto (plumnomo de Koffi Gbeglo), la redaktanto de *Ondo da Vero*, furiozis kontraŭ tio (Ajto 1995: 5-6).

Liaopinie esperantistoj devas reprezenti la landojn kie ili loĝas, kaj kies movadon ili plej bone devus (lerni) koni. Li argumentas ke oni, post foresto, ne plu sufiĉe konas la movadon de sia devenlando por povi reprezenti ĝin. Estas necese ke oni ekkonu la movadon de la lando kie oni loĝas kaj ke tiuj kiuj ĉiam loĝadis tie, donu egalajn rajtojn al la novvenintoj kaj plene enkonduku ilin en la koncernan movadon. Adanou Efoe estis ekdecidinta reprezenti UTEn, pro tio ke li estis ne komplete informita de la estraro de GEM pri la kongreso, kvankam li kunorganizis ĝin. Minani G. Matabaro estas admonita en la artikolo ne kumuli samtempan reprezentadon de kvar landoj. Parfo Ajto pledas tiam por *Esperantujismo*, al kiu li donas la signifon ke inter esperantistoj oni ne konsideru la naciecon de la alia persono, sed ke plej gravu la sento de alproksimiĝo kaj frateco.

4.1.4. Kvara Afrika Kongreso, Moshi, Tanzanio

26/12/1995-3/1/1996, Temo: "Imagoj de Afriko: kontinento de espero aŭ de malespero"

Ĉi tiun fojon la kongreso okazis en la antaŭvidita periodo, kaj unuafoje

en Orienta Afriko. Ĉe la piedo de Kilimanĝaro kunvenis 38 partoprenantoj el Tanzanio, Burundio, Zimbabvo kaj ses eŭropaj landoj. Oni povus denove sin demandi kial tiom malmultaj afrikaj esperantistoj ĉeestis, en momento kiam la tanzania movado estis konsiderata kiel la plej forta en Orienta Afriko (Jacobsen 1996: 21). El interparoloj en Tanzanio evidentiĝis ke eĉ kongreson en propra lando oni trovas tro multekosta, interalie koncerne transportkostojn, tagojn dum kiuj oni ne povos labori kaj la restadon surloke (pers. kom., 8/1998).

La unuajn tagojn la dek eŭropanoj utiligis por alklimatiĝi kaj eklerni la svahilan. Dum la oficiala malfermo la distriktestro promesis zorgi pri tio ke la esperantistoj povu libere disvastigi sian lingvon en lia regiono. Tio estis valora promeso, ĉar la kontraŭagado de tiuj kiuj rigardis Esperanton kiel minacon al la ĝenerala instruado de la nacia lingvo jam estis sentebla antaŭe (Jacobsen 1996: 21).

Kiel enkondukon al la diskutado pri la kongresa temo, Minani Matabaro skizis la historian, politikan kaj socian evoluon de la kontinento. Je la fino li demandis: "Kaj kion vi povas fari por ke Afriko fariĝu kontinento de espero?" La eŭropanoj interpretis tion ĉi kiel demandon nur al ili mem direktitan kaj estis surprizitaj pri tioma naiveco (Jacobsen 1996: 21). La parolinto volis tamen diri ke ĉiu el ni povas helpi fari el Afriko kontinenton de espero (Matabaro, pers. kom., 6/9/1998). La diskuto poste direktis sin al la premisoj de la afrika demokratio.

Oliver Mazodze

La unua afrika Cseh-instruisto, Oliver Mazodze el Zimbabvo, prelegis pri afrikaj vortradikoj en Esperanto, fakte pri ilia manko. Li proponis enkonduki iujn, almenaŭ por afrikaj realaĵoj. Oni ankaŭ okazigis progresigan Esperanto-kurson (Jacobsen 1996: 21).

La Tanzania Esperanto-Asocio voĉdonis por nova estraro, kiu dume daŭre atendas anstataŭiĝon, kvankam legeblas

en la statuto ke tio ĉi devas okazi ĉiun duan jaron. Neniu rezolucio estis akceptita (Bakker, pers. kom., 14/4/1999).

El la vidpunkto de eŭropano la kongreso estis granda paŝo antaŭen por la juna Tanzania Esperanto-Asocio, ĉar ĝi estis pruvinta sin kapabla organizi internacian kongreson kaj ĉar la ĉeesto de diversaj eminentuloj devus montriĝi avantaĝa por la publikaj rilatoj (Jacobson 1996: 21). En la praktiko tamen evidentiĝis ke tiuj ĉi avantaĝoj ne estis utiligitaj de la nova estraro.

4.2. Postkonsideroj

Tio kio tuj altiras la atenton, krom la ade malpliiĝanta nombro de partoprenantoj, estas la fakto ke neniu el la kvar kongresoj vere estis afrika kongreso. Per tio ĉi ni ne aludas la programerojn, kiel Kamphausen rimarkigis, sed la naciecojn de la partoprenantoj. Fakte ili estas regionaj kongresoj, ĉar la partoprenantoj kiuj venas de pli malproksime ol najbara lando, estas maloftaj. Certe estas gastoj el aliaj kontinentoj, sed eĉ el Sud-Afriko, kiu tamen estas relative riĉa, ne venas reprezentantoj. Tamen manko de mono estas la ĉefa kaŭzo pro kiu la partoprenantoj, escepte de la eŭropaj aŭ amerikaj, preskaŭ ĉiam venas el la gastlando aŭ ĉirkaŭaj landoj. Krome, se ja eblas ŝpari por multekosta vojaĝo, oni preferas elekti UKon en Eŭropo, eĉ al UK en alia kontinento (John Daniël, pers. kom., 2/9/1998).

Tamen tiuj ĉi kongresoj estas gravaj. Afrikanoj el diversaj landoj, eĉ se la nombro de landoj estas limigita, tiel havas finfine la eblon vere paroli Esperanton kun samideanoj kiuj ne parolas ilian propran unuan aŭ duan lingvon. En tia maniero ili kelkkaze unuafoje travivas veran Esperanto-etoson, kiun, pro manko de mono, ili ne povas travivi dum UKoj. Gravas ankaŭ ke ili povas reciproke interdiskuti la problemojn de siaj respektivaj movadoj. Pro konfrontiĝo ankaŭ ekestas konfliktoj (kiel dum la tria kongreso), sed principe ili devus povi konduki al fruktodona kunlaborado kaj interŝanĝo de ideoj, ĉar iliaj problemoj estas samspecaj, dum tiuj sufiĉe diferencas de la problemoj de aliaj kontinentoj.

Kvankam dum la Tria Afrika Kongreso estis decidite organizi kongreson ĉiun duan jaron, nun jam pasis pli ol tri jaroj de kiam la lasta okazis.

Dum la Kvara Afrika Kongreso oni pri tio nek prenis decidon, nek akceptis rezolucion. En okcidenta Afriko oni parolas pri ĝi jene: "La kongreso foje devis iri ankaŭ al orienta Afriko, sed tie ĝi mortis" (Halaoui, pers. kom., 28/12/1998). Togolandano kaj ganaano, ambaŭ estraranoj en siaj respektivaj asocioj, faris post tiu ĉi rimarkigo (dum la sesa togolanda kongreso) la unuajn neprecizajn planojn por kvina afrika kongreso en Togolando. Oni devos atendi ĉu tio havos iun ajn rezulton, ĉar ili ankoraŭ daŭre finance dependas de UEA.

Plie oni devas konkludi ke preskaŭ neniu rezolucio estas efektivigita. Rezolucioj kiuj certigas ke la afrikaj ŝtatoj subtenu la Esperanto-movadon kaj devas enkonduki Esperanton en la lernejojn, eble ankaŭ estas multe tro optimismaj, ĉar eĉ en Eŭropo tio ĉi okazas malofte. Pli efektivigebla, sed ankoraŭ ne sufiĉe aplikita, estas verŝajne la punkto kiu konsilas al la kluboj kaj al la asocioj kunlabori kun la naciaj sekcioj de neregistaraj organizaĵoj.

En la rezolucioj ankaŭ ĉiufoje reelmontriĝas la espero rajti organizi UKon en Afriko. La lasta dato kiun oni fiksis en rezolucio, estis la jaro 2000. Sed oficiale la kongresurboj nun jam estas fiksitaj ĝis 2001 (Zagrebo, Kroatio), pro kio ankaŭ tio ne plu eblas. Krome oni decidos dum la kongreso en Berlino, en aŭgusto 1999, kie la UK en 2002 okazos, kaj por tio la kandidatoj estas Brazilo kaj Belgio.

Yao Afantchao-Biakou, kiu en la 83a UK en Montpeliero en 1998 salutis la kongresanojn en la nomo de la togolanda Esperanto-movado, tiam diris ankaŭ ke li volas UKon en Afriko "antaŭ la fino de la unua jardeko de la tria jarmilo". Afriko tiam estos la lasta kontinento en kiu tiu grava evento okazos. La demando povus esti ĉu ili per tiuj ĉi kvar afrikaj kongresoj akiris sufiĉan sperton por organizi UKon, sed Azio tute ne havis tiun sperton, kaj tamen tie jam okazis tri UKoj (1965-Japanio, 1986-Ĉinio, 1994-Koreio) (JL de UEA 1998). Aliflanke ja devas esti dirite ke la tiea movado havas multe pli firman pozicion, kaj ke por funde prepari Universalan Kongreson, tre multaj klopodoj kaj rimedoj estas bezonataj. Evidente UEA ankoraŭ ne juĝas la afrikan movadon kapabla je tio. Tio ĉi tamen havas rilaton ankaŭ kun la malfavora politika kaj ekonomia situacio en Afriko, kaj ne nur kun la tiea movado mem.

Tiu ĉi certe povus esti memstara en diversaj landoj, kiel en Kongo, Togolando kaj Madagaskaro, se la ĝenerala kaj ekonomia situacio estus pli bona.

Notoj

[1] *De Esperanto-beweging in Afrika – met bijzondere aandacht voor Tanzania en Togo,* 1999, Gent: propra eldono.

[2] Surbaze de tiu ĉi tria parto mi aperigis artikolon titolitan "La Esperanto-movado en Tanzanio kaj Togolando" en *Esperantologio / Esperanto Studies* (2001/nr-o 2: 5-10).

[3] Ni konsideras ĉi tie la geografian Afrikon: enestas do ankaŭ informoj pri kelkaj insuloj kaj enklavoj kiuj post la sendependiĝo de plejparto de la afrikaj landoj daŭre estas politike parto de Eŭropo: ekz. Kanarioj (hispana insularo), Madejro (portugala insulo), Melilla (Melilo) kaj Ceuta (Ceŭto) (hispanaj duonenklavoj en Maroko).

[4] Krom la mencio en *Esperanto* (1933 29/1: 17) ke oni jam dum jaroj provis ekinteresi la misiojn sen grandioza sukceso, ni ne trovis signojn pri frua strukturita informado aŭ varbado.

[5] Pro la ofta uzo de tiu ĉi fonto, ni uzas la jenan mallongigon por ne tro pezigi la tekston: KEL.

[6] Ekde nun: EdE.

[7] En la sekvaj paĝoj mallongigitaj per JL. Plenaj titoloj troveblas en la bibliografio.

[8] Mallongigite en la cetera teksto per RE.

[9] Nomoj de la landoj laŭ la originala fonto.

[10] Tie la demando tekstas jene: "5. kiom da membroj via grupo havas je la fino de l'jaro 1926?" En la dua alvoko la demandolistoj (apartaj por grupoj, izoluloj kaj asocioj) ne aperis.

[11] Pro historiaj/sciencaj kialoj ni citas ĉi tie la nomojn de la landoj ekzakte tiel kiel ili aperas en la originala fonto, sed ĉar intertempe la politika realo kaj la ortografio de la landnomoj multe sanĝiĝis, ni aldonas interkrampe la nunan nomon kiam ne estas klare pri kiuj landoj temas. Kiam necesas pliaj informoj, tiuj troveblas en notoj.

[12] Ekde 1979 nomita Bioko, insulo en la Golfo de Gvineo, apartenanta al Gvineo Ekvatora (v. noton 13).

[13] Nun Gvineo Ekvatora, inkluzivas la insulon Fernando-Po aŭ Bioko (v. noton 12). En la listo kun urbonomoj, listiĝas ĉe ambaŭ 'landoj': Bata, grava havenurbo ĉe la marbordo de Gvineo Ekvatora. Do aŭ Fernando-Po estas superflua en la statistiko, aŭ la nomo de la urbo sub Fernando-Po en la listo ne ĝustas. Ĉar laŭ la statistiko en ambaŭ 'landoj' estas same nur unu esperantisto, ni inklinas kredi la unuan sugeston.

[14] Estis granda provinco en Sud-Afriko antaŭ 1994; ĝia teritorio nun kovras la tutajn provincojn Okcidenta Kaboprovinco kaj Norda Kaboprovinco kaj parte la provincojn Nordokcidenta Provinco kaj Orienta Kaboprovinco.

[15] Portugala Kongo estas nun la angola provinco Kabinda, kiu situas inter la Popola Respubliko Kongo kaj la Demokratia Respubliko Kongo, do disigita de la cetera Angolo.

[16] Ekde 1994 formas, kun la antaŭa bantuujo Zululando, la provincon Kvazuluo-Natalo, en Sud-Afriko.

[17] Ekde 1994 formas, kun la antaŭa bantuujo QwaQwa, la provincon Liberŝtato, en Sud-Afriko.

[18] De 1911 ĝis 1964 dividita inter Norda Rodezio (Zambio ekde sendependiĝo en 1964) kaj Suda Rodezio (Rodezio de 1964 ĝis 1979, Zimbabvo-Rodezio en 1979 kaj ekde sendependiĝo en 1980, Zimbabvo).

[19] Temas pri Itala Somalilando, kiu ekde 1960 unuiĝis kun Brita Somalilando por formi la hodiaŭan Somalion.

[20] Franca Sudano egalis precipe al la nuna Malio, sed dum kelkaj periodoj enhavis ankaŭ aliajn okcidentafrikajn landojn – ĉi tie temas nur pri la hodiaŭa Malio.

[21] Ĝis 1994 provinco de Sud-Afriko; la teritorio kovras nun la tutan provincon Gauteng, kaj partojn de la provincoj Norda Provinco/Limpopo, Mpumalango kaj Nordokcidenta Provinco.

[22] Pro tio ke la hodiaŭa Sudano, tiam nomata Angla Sudano, de 1899 ĝis la sendependiĝo en 1956 estis parto de la angla-egipta dominio, Egiptio kaj Sudano estas ĉi tie traktataj kune.

[23] Laŭ Migalli [= Megalli] Tadros (1946: 3) EEA fondiĝis en 1910.

[24] *Al-lugha al-'ālamiyya* (*isbirāntū*). *Esperanto: la internacia lingvo*, [1930], Genève, Universala Esperanto-Asocio.

[25] Franca Sudano (v. noton 20 kaj §1.2.1.) kaj Angla Sudano (nun Sudano, v. ankaŭ noton 22) estas kune metitaj sub la nomo Sudano en EdE.

[26] Islamana Asocio de Junaj Viroj.

[27] La araba ŝlosilo, *Miftāh al-isbirāntū*, aperis en 1930, en traduko de Fahim Harfouche, prezidanto de "Esperanto-Grupo de Port Said", kiu estis la eldoninto. Tamen laŭ la Jubilea Jarlibro de UEA 1937 la eldonloko estus Kairo.

[28] Junulina Kristana Asocio.

[29] Kristana Asocio de Junaj Viroj.

[30] La antaŭan germanan kolonion Togolando okupis parte Francio kaj parte Britio dum la unua mondmilito. En 1922 la du partoj iĝis koloniaj mandatoj de la Ligo de Nacioj. La malpli granda parto, Brita Togolando, aliĝis en marto 1956 al Ora Bordo, kiu en 1957 sendependiĝis sub la nomo Ganao. La pli granda parto, Franca Togolando, sendependiĝis en 1960 kaj iĝis la nuna Togolando.

[31] Vidu notojn 20 kaj 25.

[32] Tanganjikio kaj Zanzibaro unuiĝis en 1964 kaj formas ekde tiam la landon Tanzanio. Ili estas ĉi tie traktataj kune.

[33] Ekde la Berlina Konferenco (1884-85) ĝis 1908 nomata Liberŝtato Kongo, poste Kongo Belga ĝis la sendependiĝo en 1960. Ekde la 27an de oktobro 1971 Zairio, kaj ekde la 17a de majo 1997 denove Kongo.

[34] Vidu noton 18.

[35] La antaŭe apartaj ŝtatoj Kablando, Natalo, Oranĝa Liberŝtato kaj Transvaal unuiĝis en 1910, tiel formante la Sud-Afrikan Union. Post la erao de apartismo, en 1994 la kvar provincoj unuiĝis kun la bantuujoj, kreante la modernan Respublikon de Sud-Afriko. Ĉi tie ĉiuj tiuj teritorioj estas traktataj kune.

[36] *The international language Esperanto – Common language for Africa – Common language for the world.* 1962, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

[37] *La langue internationale Espéranto. La langue commune pour l'Afrique. La langue commune pour le monde entier*. 1962, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

[38] *Al-lugha al-dūaliyya al-isbirāntiyya. Lugha al-'ālam adjma'*. 1962, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

[39] Ni citas ĉi tie el la neniam eldonita, originala teksto, kiun afable disponigis al ni s-ino Erzsébet Székely.

[40] Ekzemplo estas la en 1966 starigita "Afrika Esperantista Grupo en Belgujo", kies membroj estis kongaj studentoj kiuj sekvis E-kurson en Bruselo. Prezidanto estis Jacques-Hilaire Mpoy. En la sama jaro la grupo aliĝis al Konga E-Instituto (*Afrika Revuo* 1966 3/2: 7 kaj 3/4: 4).

[41] Kvankam jam de 1974 la membrokotizoj de UEA kaj TEJO estis diversigitaj kiel eble plej multe laŭ la ekonomia nivelo de la koncernaj landoj, tio okazis nur por tiuj landoj en kiuj UEA havis kotizperanton. Nur ekde la membrojaro 1980 tiu problemo estis grandparte solvita: ekde tiam, principe por ĉiuj landoj ekzistis aparta tarifo, bazita sur la kontribuo kiun la koncerna ŝtato devis fari al Unuiĝintaj Nacioj (*Esperanto* 72/10: 178).

[42] Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1983.

[43] Germana fondaĵo, ligita al la germana liberala partio FDP.

Bibliografio

Antaŭrimarko: Pro la granda nombro de anonimaj artikoloj, ni decidis ne listigi tiujn ĉi en la sama listo kun la libroj kaj subskribitaj artikoloj. Dekoj da (anon.)-oj malhelpus superrigardi la tuton. Tial, ĉi tiuj fontoj estas listigitaj en kronologia ordo, sub la titolo de la periodaĵo. Post tio sekvas la subskribitaj artikoloj, la libroj kaj la broŝuroj, laŭ aŭtoro. Sekve listiĝas la jarlibroj, adresaroj, kaj kongreslibroj, kaj laste aperas listo de la fontoj el kiuj ni prenis la fotojn.

La ciferoj post la titolo de periodaĵo indikas sinsekve la jenajn: aperjaron, numeron ene de la aperjaro kaj paĝonumerojn.

Laŭ revutitolo

AFRIKA ESPERANTISTO
1956 *Afrika Esperantisto* 1/2: 1-7.

AFRIKA REVUO (el Maroko)
1947 *Afrika Revuo* 3/1: titolpaĝo.
1947 Nia enketo. *Afrika Revuo* 3/6-9: dorspaĝo.

AFRIKA REVUO (el Kongolando)
1966 K.E.I.-komunikoj. *Afrika Revuo* 3/2: 7.
1966 K.E.I.-komunikoj. *Afrika Revuo* 3/4: 4.

AFRIKA VOĈO
1949 *Afrika Voĉo* n-ro 9, septembro 1949.

LA EGIPTA ESPERANTISTO
1922 Esperanto en Egipto. *La Egipta Esperantisto* 1/1: 6-7.
1922 Al la Afrika Esperantistaro. *La Egipta Esperantisto* 1/2: 14.

ESPERANTO (RE)
1912 Statistiko de la Esperantianoj. *Esperanto* 8/13: 205.
1914 Statistiko de la membroj de UEA. *Esperanto* 10/13: 210-1.
1921 Tra la mondo esperantista. *Esperanto* 17/6: 117.
1921 Kroniko – Afriko. *Esperanto* 17/11: 191.
1927 Egipto. *Esperanto* 23/3: 61.
1927 Maroko. *Esperanto* 23/3: 66.

1928 Insulo Sta. Tomaso (Afriko). *Esperanto* 24/2: 40.
1928 Kroniko – Egipto. *Esperanto* 24/3: 67.
1933 Kroniko – Togo. *Esperanto* 29/1: 17-18.
1933 Bildpaĝo de Esperanto. *Esperanto* 29/12: 199.
1949 Tra la mondo esperantista – Egiptujo. *Esperanto* 42/5: 58.
1949 Kongo Belga. *Esperanto* 42/6: 75.
1950 Sud-Afriko – Unuafoja instruo de Esperanto kaj publika institucio. *Esperanto* 43/6: 84.
1951 Maroko – radiodissendo de Esperanto. *Esperanto* 44/2: 36.
1952 Maroko – radio. *Esperanto* 45/3: 69.
1952 Egiptujo. *Esperanto* 45/5: 133.
1952 Maroko – progresraporto. *Esperanto* 45/5: 134.
1956 Norda Rodezio. *Esperanto* 49/1: 3.
1957 La Ĉefaj Kulturaj Aranĝoj. *Esperanto* 50/9: 128-129.
1960 Tra la mondo – Zanzibaro. *Esperanto* 53/5: 90.
1960 Granda Esperanto-Ekspozicio en Johannesburg, Sud-Afriko. *Esperanto* 53/6: 104.
1961 Tra la mondo – En Mozambiko. *Esperanto* 54/1: 17.
1961 Mozambiko. *Esperanto* 54/10: 178.
1963 Rajtigo de U.E.A. al Tibor Sekelj. *Esperanto* 56/1: 16.
1963 Lingvoj en Afriko – opinioj kaj spertoj. *Esperanto* 56/7-8: 122-3.
1975 Sufiĉas havi bonan volon. *Esperanto* 68/6: 108.
1979 Kotiztabelo por 1980. *Esperanto* 72/10: 178.
1979 Loke – Afriko. *Esperanto* 72/12: 214.
1987 Premio Deguchi "por Afriko". *Esperanto* 80/9: 161.
1991 Venis unu amik' el Afrik'. *Esperanto* 84/9: 173.
1997 Landa kaj regiona agado – Ĝemela helpo interlande. *Esperanto* 90/6: 110-1.
1998 Landa kaj regiona agado – Senfanfarona solidaro. *Esperanto* 91/6: 110.

ESPERANTO EN AFRIKO

1970 Komisionanoj. *Esperanto en Afriko* 1/1: 1.
1992 La dua afrika kongreso. *Esperanto en Afriko* 6/2: 2.

FRANCA ESPERANTISTO

1933 Conseil d'administration de la S.F.P.E.: Séance du 11 Juillet 1933. *Franca Esperantisto* 1/1: 14.

KOMUNA ESPERANTO-GAZETO

1984 Vigliĝanta Esperanto-movado en Afriko. *Komuna Esperanto-Gazeto* 16/5: 58.

La Alĝer(i)a Stelo

1905 Nia celo. *La Alĝera Stelo* 1/1: 2.
1905 Alvoko. *La Alĝera Stelo* 1/1: 3.
1905 *La Alĝeria Stelo* 1/3: 1.
1905 Al niaj Abonantoj. *La Alĝeria Stelo* 1/9: 1.
1905 Pri la vorto "Alĝero". *La Alĝeria Stelo* 1/11: 4.
1905 Avizoj. *La Alĝeria Stelo* 1/12: 1.
1905 Pri "La Alĝeria Stelo". *La Alĝeria Stelo* 1/18: 1.
1906 *La Alĝeria Stelo* 2/1: 1.
1906 Alĝera Esperantista Laboristaro. *La Alĝeria Stelo* 2/3: 19-20.
1906 Pri "La Alĝeria Stelo". *La Alĝeria Stelo* 2/9: 71.

La Egipta Esperantisto

1946 La unua etiopianino. *La Egipta Esperantisto* 2/10 (suma): 2.

La Egipta Espero

1933 Ĉe la Y.M.M.A. *La Egipta Espero* 1/2: 5-6.

La Praktiko

1933 *La Praktiko* 2/4: 6.

L'Espérantiste

1905 Société française pour la Propagation de L'Espéranto – Nouveaux candidats (novaj kandidatoj). *L'Espérantiste* 8/6: 124-125.

Libera Tribuno

1946 "Nova" Gazeto. *Libera Tribuno* 1/1: 1.

Ondo da Vero

1996 Rezolucio de la tria Togolanda Esperanto-Kongreso. *Ondo da Vero* 3/1:7.

Per Unu Voĉo

1946 *Per Unu Voĉo* 3/6: [260].

Tamen

1962 Komuniko pri starigo de la Centro de Esploroj pri Afriko ĉe la Estraro de Pola Esperanto-Junularo. *Tamen* 4/9: 25.

Laŭ aŭtoro

AJTO, PARFO (plumnomo de Koffi Gbeglo)
1995 Esperantujismo. *Ondo da Vero* 2/1: 5-6.

AULD, WILLIAM (red.)
1958 *Esperanta Antologio – poemoj 1887-1957.* La Laguna: Stafeto.

AZCUÉNAGA, JUAN
1975 Regiona agado de TEJO – kien? *Esperanto* 68/5: 94.

BAKKER, HANS
1982 Investoj en Afriko. *Esperanto* 75/7-8: 125-127.
1989 *Raporto pri la agadjaro 1988* (ne publikigita).
1990a Por plia jardeko da Esperanto en Afriko. *Esperanto* 83/1: 2-4.
1990b Unua afrika kongreseto. *TEJO Tutmonde* 8/3: 29-30.
1991 *Agi en Eksterafrikujo – Konsiloj kaj sugestoj kiel partopreni la afrikan agadon*. [Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio].
1993 Ganao survoje al Tria Afrika Kongreso. *Esperanto* 86/5: 88.
1994a La Tria Afrika Kongreso. *Esperanto* 87/5: 83.
1994b Varma nova jaro! *Franca Esperantisto* 62/11: 178.

BERG, C.C.
1964 Novaj respondecoj de la Esperanto-movado. *Esperanto* 57/10: 162-3.

BULLER, OSMO
1998 Afrikano unuafoje en la Estraro. *Esperanto* 91/9: 148-9.

CAPÉ-MONTROSIER, AUGUSTE
1905 Antaŭen la gejunuloj. *La Alĝera Stelo* 1/1: 1-2.

CORSETTI, RENATO
1971 Ekstereŭropigo – Tasko de TEJO. *Esperanto* 64/12: 201.
1974 La neplugita kampo. *Esperanto* 67/12: 203-5.

DE KOCK, EDWIN
2004 *Cent jaroj da Esperanto en Sud-Afriko*, *Testamente – Poezio kaj Prozo*. [Edinburg]: propra eldono.

DE SMET, WIM
1963 Kongolando kaj Sud-Afriko. *Esperanto* 56/7-8: 123.

DIETTERLE, JOHANNES
1926 Tra la mondo esperantista – Alvoko al la tutmonda esperantistaro, al ĉiuj asocioj, grupoj, izolaj esperantistoj, havigi al nia movado por la "jubilea jaro 1927" nombradon de nia popolo en kompleta statistiko. *Esperanto* 22/10: 185-187.
1927a Tra la mondo esperantista – Ĉu la "Tutmonda Statistiko" sukcesos? *Esperanto* 23/3: 60.
1927b Tra la mondo esperantista – Lasta alvoko rilate la Tutmondan Statistikon. *Esperanto* 23/10-11: 191-192.
1928 Tutmonda Statistiko Esperantista. *Esperanto* 24/7-8: 134-156.

GBEGLO, KOFFI
1991 Raporto pri la unua afrika kongreso de Esperanto. *Esperanto en Afriko* 5/1: 4-6.
1995 2. La 3-a Afrika Kongreso. *Ondo da Vero* 2/1: 3-4.

GOLDEN, BERNARD
1985 Esperanta mispropagando por Afriko. *La Kancerkliniko* 9/1: 16-7.

GRUNER, HORST
1994 Esperantumu ĉe la fontoj de Nilo. *Esperanto* 87/2: 26.

HALAOUI, KIBANOU FELIX
1995 Rezolucio de la tria Afrika Kongreso de Esperanto. *Ondo da Vero* 2/2: 8.

HALL, KATELINA
1992 Karaj legantaj geamikoj. *Afrika Reto* 1/1: 1.

ISAAC, NASSIF
1967 *Vojaĝimpresoj de egipto tra Eŭropo kaj Azio per Esperanto*. [Kairo]: Eldono de la aŭtoro.

ISMAIL, IBRAHIM
1928 El naturo kaj scienco – Somalio. *Esperanto* 24/6: 118-120.

JACOBSEN, JESPER LYKKE
1996 Ĉu kontinento de espero? *Esperanto* 89/2: 21.

JAKOB, HANS
1928 Oficiala Informilo. *Esperanto* 24/6:125.

JANSEN, WIM
1970 TEJO en Afriko. *Esperanto* 63/5:84.

KÖKÉNY, L. & V. BLEIER (red.) (EdE)
1933-1934 *Enciklopedio de Esperanto, Vol. I-II.* Budapest: Literatura Mondo.

LANDES, LUDOVIKO
1905a Esperanta Ekspozicio en Alĝer. *La Alĝeria Stelo* 1/6: 1-2.
1905b Universala Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer. *La Alĝeria Stelo* 1/11: 1-2.

LAPENNA, IVO (ĉefred.)
1974 *Esperanto en perspektivo.* London/Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio/ Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.

MAXWELL, DAN
1991 Elsendu la vokon – vivu AK-oj! *Esperanto* 84/2: 21-22.

MEGALLI, TADROS
1945 T. Megalli pri la Movado en Kajro. *La Egipta Esperantisto* 2/1: 4.
1946 Tion la praantikva piramido eble ne sonĝis. *Heroldo de Esperanto* 22/1: 3.
1947 Tra la mondo esperantista – Egiptujo. *Esperanto* 40/12: 176.
1948 Tra la mondo esperantista – Egiptujo. *Esperanto* 41/2: 20.

MEGALLI, THEO
2003 …vegetarisch und natürlich 'Esperanto'. *Natürlich vegetarisch* 54/1: 12.

MILOJEVIĆ, SIMO
1977 Ne sufiĉas unu komisiito por tri kontinentoj. *Esperanto* 70/3: 41-42.
1978a Kontinento kie ni mankas. *Esperanto* 71/4: 69-70.
1978b Fari sian laboron signifas ne fari sufiĉe. *Esperanto* 71/5: 89-90.
1992 Afero de infanoj kaj gejunuloj. *Esperanto* 85/1: 4.

MODAN, DORON
2005 Araba-Juda lingvo de paco. *Israela Esperantisto* 48/1: 10-15.

ORELLANA ROJAS, ATILIO
1995 Ganao havis bonan TAK-on. *Esperanto* 88/3: 41.

PIETRUCHA, JERZY
1963 La afrikaj iniciatoj de PEJ. *Pola Esperantisto* 43/5-6: 7.

ROUSSEAU, HENRI
1964 Lingvoj en Afriko: afrika vidpunkto. *Esperanto* 57/10: 164-5.

SEKELJ, TIBOR
1962a *Esperanto: Komuna Lingvo por Afriko – Komuna lingvo por la mondo.* Ms.
1962b Karavano de Amikeco tra Afriko. *Esperanto* 55/11: 190-3.

1962c *The international language Esperanto – Common language for Africa – Common language for the world.* Rotterdam: Universala Esperanto Asocio.
1963 Sukcese finiĝis la Karavano de Amikeco. *Esperanto* 56/12: 206-7.
1991 *Ĝambo rafiki – La Karavano de Amikeco tra Afriko*. Piza: Edistudio.

SIKOSEK, ZIKO MARCUS
2005 *Sed homoj kun homoj – Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.

SONNABEND, HELMUT
1980 Malto – dua ponto al Afriko. Loko de la ĉi-jara konferenco de ILEI. *Internacia Pedagogia Revuo* 10/1: 1.

SONNENFELD, ERNESTO
1964 Kion ni volas atingi en Afriko? *Esperanto* 56/12: 206-7.

STARR, MARK
1963 Letero el Ugando. *Esperanto* 56/7-8: 122-3.

STEINER, HUGO
1938 *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj.* Bisamberg: Eldono de la aŭtoro.
1947 *Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj.* Korneuburg: Eldono de la aŭtoro.

SZERDAHELYI, ISTVÁN (KEL)
1979-1982 *Krestomatio de Esperanta Literaturo – Tekstoj, dataro, bibliografio, Vol. I-III*. Budapest: Tankönyvkiadó.

TIETTI, DELFENO (plumnomo de Koffi Gbeglo)
1994 Ni memoru la unuan afrikan kongreson. *Ondo da Vero* 1/3: 4-5.

TIETo (plumnomo de Koffi Gbeglo)
1995 3. Ankaŭ kvar aktivaj E-istoj Togolandaj partoprenis la trian AK. *Ondo da Vero* 2/1: 4-5

TONKIN, HUMPHREY
1964a Lingvoj en Afriko: Laikula vidpunkto. *Esperanto* 57/6: 102-5.
1964b Responde al s-ro Rousseau. *Esperanto* 57/10: 165.

TRUJILLO CASAÑAS, LEANDRO
1997 40-a datreveno de la Esperanta Societo de Tenerife. http://www.terra.es/personal2/letruca/webdoc13.pdf.

WINKLER, G.D.
1972 Informas la Afrika Komisiono de TEJO. *Esperanto* 65/11: 196.

Jarlibroj, Adresaro

1899-1900 *Jarlibro 1899-1900*. Épernay: Societo por la Propagando de Esperanto.
1900-1901 *Jarlibro 1900-1901*. Épernay: Societo por la Propagando de Esperanto.
1901-1902 *Jarlibro 1901-1902*. Épernay: Societo por la Propagando de Esperanto.
1903 *Jarlibro 1903*. Épernay: Societo por la Propagando de Esperanto.
1908-1910 *Oficiala Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio*. Paris/Genève: Universala Esperanto-Asocio.
1911-1916 *Oficiala Jarlibro*. Genève: Universala Esperanto-Asocio.
1919 *Oficiala Adresaro*. Bern: Universala Esperanto-Asocio.
1920 *Oficiala Jarlibro*. Bern: Universala Esperanto-Asocio.
1921-1923 *Oficiala Jarlibro*. Genève: Universala Esperanto-Asocio.
1924-1936 *Oficiala Jarlibro de la Esperanto-Movado*. Genève: Universala Esperanto-Asocio.
1937 *Jubilea Jarlibro de la Esperanto-Movado*. Genève: Universala Esperanto-Asocio.
1937-1946 *Jarlibro de la Internacia Esperanto-Ligo*. Heronsgate: Internacia Esperanto-Ligo.
1938-1940 *Jarlibro de la Esperanto-Movado*. Genève: Universala Esperanto-Asocio.
1947 *Jarlibro I.E.L.-U.E.A.* Heronsgate: Universala Esperanto-Asocio.
1948-1955 *Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio*. Heronsgate: Universala Esperanto-Asocio.
1956-1960 *Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
1998 *Jarlibro 1998*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
1932-1939 *Jarlibro*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.

Kongreslibroj

1907-1922 Esperantista Dokumentaro. I. Oficiala parto. Sekcio A: kongresoj. Paris: Esperantista Centra Oficejo.
1926 Esperantista Dokumentaro. Genève: Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.
1928-1934 Oficiala Dokumentaro Esperantista. Genève: Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.
1935-1937; 1948; 1952-1957; 1959-1998 Kongresa Libro.
1938-1939; 1947; 1958 Kongreslibro.
1951 Listo de Kongresanoj.

Fontoj de la ilustraĵoj

p. 16 Szerdahelyi, István, *Krestomatio de Esperanta literaturo – tekstoj, dataro, bibliografio*, *Vol. I-III*. Budapest: Tankönyvkiadó, 1979-82: 435.
p. 17 *La Alĝeria Stelo*, 1905 1/8: titolpaĝo.
p. 20 *La Egipta Esperantisto*, 1949 5/20 (suma): titolpaĝo.
p. 22 Egipta samideano en Skandinavio. *Esperanto,* 1950 43/7-8: 106.
p. 24 De Kock, Edwin, Juan Régulo Pérez. *Esperanto*, 1993 86/3: 45.
p. 25 Sikosek, Ziko Marcus, *Sed homoj kun homoj – Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005.* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2005: 85.
p. 26 *Afrika Revuo*, 1947 3/1: titolpaĝo.
p. 29 *La Praktiko*, 1933 2/4: 6 (Anomah).
p. 29 Bildpaĝo de Esperanto. *Esperanto*, 1933 29/12: 199 (Quist).
p. 33 De Kock, Edwin, *Fajro sur mia lango*. La Laguna: J. Régulo, 1967: kovrilo.
p. 34 *Sleutel vir Esperanto,* 1934: kovrilo.
p. 37 Ismail, Ibrahim, El naturo kaj scienco – Somalio. *Esperanto*, 1928 24/6: 118.
p. 40 Karavano de Amikeco tra Afriko. *Esperanto*, 1962 55/11: 190.
p. 41 Sekelj, Tibor, *Ĝambo rafiki – la karavano de amikeco tra Afriko*. Piza: Edistudio, 1991: kovrilo.
p. 42 Sekelj, Tibor, *Al-lugha al-dūaliyya al-isbirāntiyya. Lugha al-'ālam adjma'*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1962: kovrilo.
p. 47 Milojević, Simo, Fari sian laboron signifas ne fari sufiĉe. *Esperanto*, 1978 71/5: 89.
p. 51 Corsetti, Renato, *Kwa kulinda tamaduni za Afrika*. Rotterdam: UEA/TEJO, 1979: titolpaĝo.
p. 53 Vessella, Nino, *Jifunze lugha ya Kiesperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1983: kovrilo.
p. 54 *Tangazo*, anonco el *Uhuru*, 30an de marto 1983.
p. 55 Fettes, Mark (red.), *Jubileo – jarcento de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988: 89.
p. 56 Transdono de la premio Onisaburo Deguchi. *Oomoto*, 1987 62/2: 22.
p. 57 Venis unu amik' el Afrik'. *Esperanto*, 1991 84/9: 173.
p. 59 Aliaj kongresaj aranĝoj – afrika programo. *Esperanto*, 1963 56/9: 155.
p. 62 *Esperanto*, 1999 92/5: titolpaĝo.
p. 64 Maxwell, Dan, Elsendu la vokon – vivu AK-oj! *Esperanto*, 1991 84/2: 21.

p. 67 Orellana Rojas, Atilio, Ganao havis bonan TAK-on. *Esperanto*, 1991 88/3: 41.

p. 70 Steele, Katarína, Esperantumi en Zimbabvo. *Esperanto*, 1995 98/4: 83.

En la 1980aj jaroj Esperanto rimarkinde ekdisvastiĝis en Afriko. Amaso da afrikanoj lernis la lingvon, fondis klubojn kaj landajn asociojn, kaj partoprenis en internaciaj renkontiĝoj. Afrikano fariĝis estrarano de UEA kaj ekfunkciis Afrika Oficejo de UEA. La ekesto de amasa movado en Afriko signifis veran tutmondiĝon de Esperanto. Tamen Esperanto ne estas tute nova afero en Afriko, sed ankaŭ tie la movado havas longan historion, en kiun Heidi Goes enkondukas la leganton per tiu ĉi pionira studo.

ISBN 978-929017096-9

9 789290 170969